2-32 K

89/1. * 16,– Ft

HUNGARA VIVO

Aperis unu el la sensaciaĵoj de la Kristnaska hungarlingva librooferto,
represo de
„Emlékkönyv a Székely Nemzeti Múzeum
50 éves jubileumára"
(Memorlibro por la 50 jara jubileo de la Sikula Nacia Muzeo), aperinta la unuan fojon en la jaro 1929, en du volumoj, kiuj kune kostas 470,- Ft.
Depost la libro de Balázs Orbán ĝi estas la plej altnivela libro, verkita pri sikula temo.
Omaĝe al la 110 jara jubileo de la Sikula Nacia Muzeo.
La Eldonejo por ĉiu vendita libro transpagos 10,- forintojn al la konto de helpo al la rifuĝintoj el Transilvanio.

Adreso:

CASTOR & POLLUX

Komerca, Teknika kaj Reklamperanta Etkooperativo

1011 Budapest, Fő u. 56-58. VI.42.

Mi mendas ĉe Vi la libron „Emlékkönyv a Székely Nemzeti Múzeum 50 éves jubileumára" en .....ekzempleroj.
Mi promesas pagi la prezon de la libro kaj la sendkostojn ĉe ties ricevo.
Nomo: .....
Adreso: .....

HUNGARA VIVO

ENHAVO

1956: Ĉu revolucio, popola insurekcio, kontraŭrevolucio? 2
Hungara politika kalejdoskopo 5
Rados, P.A.: Mortis la poeto... 8
Poemoj de Sándor Weöres 9
Huleŝ, A.: Unu sola kandelo 11
Béládi, I.: Unu morto *(István Nagy)* 12
Giorgi, A. de: Ĉu „abunde kaj redunde"? 13
Esperanto-fako pluiras en la Budapeŝta Universitato 15
Esparol 15
Ĉerkasova, I.A.: Davidova Biblioteko renaskiĝas 16
Franko, I.: Johano la Brava *(Mikaelo Bronŝtejn)* 17
Nemere, I.: Vi povas morti nur dufoje 18
Panoramo 20
Originala Poezio 22
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
Bálint, Gy.: La paradizo de bizonoj 24
Boronkai, Gy.: Novaj rezultoj ĉe fabrikado de aerfiltriloj por veturiloj 25
Fabrikado de brikoj kaj tegoloj 30
Ĉu laŭkutime konstrui domojn aŭ per malpezaj strukturaĵoj? 32
Recenzoj 34
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 38
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 39
Korespondi deziras 40

Sur la frontpaĝo: Óbuda, tradicia kvartalo de Budapeŝto (Foto de Z. Fejér)

Revuo de
Hungara Esperanto-Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 6.
Telefono: 563-659, 564-093
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXIXa jaro, 1989 n-ro 1
(143)

PRI POLITIKAJ EVENTOJ...

en Hungario interesiĝis multaj legantoj, petante nin aperigi artikolojn pri tio, kio okazas nuntempe en la lando. Pli frue facile ni kontentigis similan scivolon, kaj abunde ni publikigis artikolojn pri la nomita temo, sed nuntempe tia deziro metas nin en embarason. Kial? Simple pro tio, ĉar tiuj eventoj treege plirapidiĝis, kaj revuo aperanta en ĉiu dua monato absolute malkapablas aperigi ion, kio certe estos aktuala ankaŭ ĉ. du monatojn post la verkiĝo.

Tamen, en tiu ĉi numero ni provis fari nian eblon. La redaktoro lastmomente, dum la nokto tuj antaŭ la enpresejiĝo de la revuo, verkis du artikolojn pri politika temo: unu pri la akra diskuto okazinta kaj okazanta pri kiel etikedi la eventojn de la tragika aŭtuno de 1956, kaj alian — iaspecan „politikan kalejdoskopon" — mozaikece pri la politika situacio ĝenerale. Li faris ĉion por surpaperigi nur „temprezistajn" faktojn kaj konstatojn, tamen povos esti, ke ĉe la apero de la revuo ĉio ĉi montriĝos ŝima, teda, ne-leginda, kiel hieraŭa ĵurnalo.

Ĉiukaze, la interesiĝo de la legantoj estis bonvena — el ĝi ni konkludas pri tio, ke niaj legantoj havas seriozan interesiĝon pri nia malgranda lando, kaj ankaŭ pri tio, ke ili kalkulas nian revuon fidinda organo. Estas agrable scii tion.

Povas esti, ke iuj legantoj ŝokiĝos pro la tute malkaŝaj tono kaj rezonadoj de tiuj du artikoloj. Ĉu tio signifas, ke en Hungario ĉesis cenzuro? Ne — ĉar en la hungara gazetaro neniam estis formala cenzuro dum la lastaj jardekoj. Tamen ekzistis memcenzuro *de la aŭtoroj kaj de la redaktoro, eĉ se tio tuŝis plej ofte ne la esencon de la artikoloj, sed nur la vortumon, la terminologion. Nun* memcenzuro *pro eksteraj kaŭzoj ne plu estas necesa, tamen devas resti la memcenzuro* interna, *tiu de la konscienco kaj respondeco, kiun praktikas ĉiu ĵurnalisto, konscianta, ke la presita vorto estas potenco, kiun oni ne rajtas misuzi.*

Konsciu do, ke opinio, esprimita en artikolo de HV, ne nepre identas kun la opinio de la tuta redakcio, eĉ se ĝi estas subskribita de la ĉefredaktoro mem. Tiu konstato aparte validas pri la du unuaj artikoloj de tiu ĉi numero, kiujn miaj kolegoj verŝajne legos nur kune kun vi, en la finpresita revuo. La hungara interna politiko estas nuntempe tiel bunta kaj multfaceta, ke estus senespere formi pri ĝi unuecan redakcian opinion, ĉar la eventoj kvazaŭ postkuras unu la alian.

Tian epokon ni travivas nun en Hungario. Espereble la viglaj kaj freŝaj politikaj ventoj alportos al ni sunplenan printempon de nacia disvolviĝo, kaj ne pezajn nubojn de popola tragedio, kiel okazis jam ne unu fojon dum nia historio.

Vilmos Benczik



ĉu revolucio? popola insurekcio? kontraŭrevolucio?

Marĝene de komisiona raporto

La konferenco de la Hungara Socialisma Laborista Partio en majo de 1988, draste renoviginte la gvidajn organojn de la partio, decidis ankaŭ pri starigo de subkomisiono por analizi la lastajn jardekojn de la historio de Hungario. Oni atendis de la subkomisiono malkovron de la kaŭzoj, rezultigantaj la misfunkciadon de la socialisma ordo, kiu misfunkciado kondukis al la disvolviĝo de politika kaj ekonomia krizo en la lando. La subkomisiono konsistis el scienculojpartianoj, ĝin gvidis Iván *Berend T.*, prezidanto de la Hungara Akademio de Sciencoj. La kunordigo de la laboro de la komisiono estis taskigita al Imre *Pozsgay*, membro de la Politburoo. Laŭ la koncepto de la partia konferenco, la raporto de la subkomisono devos servi kiel bazo por krei la novan programon de la partio. Principe la komisiono devos fini sian laboron ĝis la 14a Kongreso de la partio, okazonta en 1990.

Politika ŝoko fine de januaro

Tamen, la subkomisiono estis pli diligenta, ol atendite, kaj fine de januaro jam estis preta skiza superrigardo pri la historio de Hungario inter 1948-1988. La raporto ampleksis ĉ. 150 tajpitajn paĝojn, kaj principe ĝi devus esti prezentita al iu el la kunsidoj de la CK. Cetere, la subkomisiono mem atentigis, ke temas nur pri skiza superrigardo, do la laboron ĝi daŭrigos, por nuancigi kaj precizigi la konstatojn de la raporto.

Tamen, okazis alie ol planite. Imre *Pozsgay*, membro de la Politburoo la 28an de januaro en intervjuo donita al tre vaste aŭskultata radioprogramo informis pri la raporto pretigita de la subkomisiono. Li dediĉis specialan atenton al tiuj paĝoj de la raporto, kiuj pritraktis la eventojn de la tragika aŭtuno de 1956, kaj citis tiun konstaton de la komisiono, laŭ kiu aŭtune de 1956 okazis en Hungario *popola insurekcio*, kaj ne *kontraŭrevolucio*, kiel la oficiala politiko dum la lastaj 32 jaroj etikedis la eventojn de 1956. Li aldonis, ke per la termino *popola insurekcio* la komisiono volis trovi kompromisan solvon, akcepteblan por ĉiu hungaro. (La popola terminologio ĝis nun nomas tiun historian eventon *revolucio.*)

Tempestaj reagoj

La vortoj de *Pozsgay* ekigis tempeston en la hungara politika vivo. La situacion faris pli komplika, ke Károly *Grósz*, la ĝenerala sekretario de la partio estis survoje al Davos (Svislando), li mem aŭdis la vortojn de *Pozsgay* en la aviadilo. Kompreneble, en Svislando jam atendis lin aro da ĵurnalistoj kun eĉ pli granda aro da demandoj. Estas atentinde, ke *Grósz* ne dementis la vortojn de *Pozsgay*, malgraŭ la fakto, ke li mem multfoje asertis publike, ke la Hungara Socialisma Laborista Partio ne antaŭvidas ŝanĝi sian oficialan opinion pri la aŭtunaj eventoj en 1956. Respondante al la ĵurnalistoj li evitis okupi definitivan starpunkton, li diris interalie: „Mi ne scias kio instigis Imre *Pozsgay* uzi tiun terminon; povas esti ke la subkomisiono malkovris novajn faktojn, kiuj pravigas tiun terminon, sed mi mem ne konas tiujn faktojn."

Miklós *Németh*, ĉefministro, membro de la Politburoo en Budapeŝto reagis tiusence, ke la tiamaj eventoj estis tre kompleksaj, do ili ne estas etikedeblaj per unusola vorto – en tiuj eventoj ĉeestis kaj la elementoj de popola insurekcio, kaj tiuj de *kontraŭrevolucia teror-ribelo*. Ankaŭ aliaj gvidantoj klopodis apartigi sin de la intervjuo de *Pozsgay*, sed neniu nete dementis lin.

Malpli diplomatie reagis la partia membraro. La Centran Komitaton atingis amaso da leteroj, kiuj esprimis ne nur malkontentecon, sed eĉ furiozon pro la vortoj de *Pozsgay*. Pluraj partiaj organizaĵoj postulis lian eksigon el la partio – eĉ en intelektulaj rondoj la membroj de la partio estis konfuzitaj. Multaj partianoj resendis al la CK altajn ŝtatajn distingojn, ricevitajn de la registaro pro partopre-

no en la subpremo de la ribelo. Montriĝis, ke la partianaro estas pli konservativa, ol oni povus supozi – ne nur la „fundamentanoj", kiuj konsistigas ĉ. trionon de la partio, sed ankaŭ la centro (ĉ. duono de la membraro) kiu alkutimiĝis al la konstanteco, iasence pigriĝis intelekte, kaj pro simpla komfortemo malŝatas ĉiajn ŝanĝojn. Nur la t.n. „reformkomunista alo" (ĉ. sesono de la membraro) salutis la novan aliron al la problemaro de 1956.

Pozsgay ne cedas

Multaj opiniis, ke vidinte la tempestajn reagojn, *Pozsgay* retiriĝos. Sed ne okazis tiel. Li partoprenis amason da kunvenoj kun la partia aktivularo, kaj argumentis por la praveco de la termino *popola insurekcio*. Li ree kaj ree ripetis la aserton, ke la hungara socio en la jaroj 1948/49 ekiris sur misa vojo, sur tiu de la stalinismo, kiu havas nenion komunan kun socialismo. Li vicigis faktojn; *Rákosi* (partiestro inter 1945-56) ekzekutigis dum nuraj kvar jaroj (1949-53) pli da komunistoj, ol la Horthy-reĝimo dum sia kvaronjarcenta ekzistado (1920-44); dum tiuj samaj kvar jaroj entute 600 mil hungaraj kamparanoj estis enkarcerigitaj por pli-malpli longa tempo pro etaj ekonomiaj deliktoj – tio, konsiderante la averaĝan nombron de la kamparanaj familioj, tuŝis almenaŭ 2,5 milionojn da homoj, do ĉ. kvaronon de la tuta loĝantaro. Al la akuzoj, ke lia radiointervjuo generas nenecesajn diskutojn en la partio, li replikis: „En tiu ĉi lando kaŭzis problemojn neniam la diskutoj, sed la falsa, trudita unueco. Tio, ke ĉiuj eraraj, neplenumeblaj, malutilaj decidoj dum la lastaj jardekoj estis akceptitaj unuanime, sen unusola kontraŭa voĉo. Jes, mi generas diskutojn, sed estas jam tempo ke la *pulmo apartiĝu disde la hepato* – li uzis metaforon, konatan plejparte nur de kamparanoj, por klarigi sian starpunkton.

Komence de februaro kunsidis la Politburoo por pritrakti la aktualajn farendaĵojn. Laŭ nekonfirmitaj informoj en tiu kunsido *Pozsgay* lanĉis la eblon ke li demisios el la Politburoo, sed oni rifuzis tiun eblon. La Politburoo decidis kunvoki eksterordinaran kunsidon de la CK por la 10a de februaro.

Kompromisa decido – kaj surprizo

La kunsido de la CK daŭris du plenajn tagojn – en la diskuto partoprenis ĉ. duono de la CK-anoj. (Menciindas, ke János *Kádár pro malsano* ne ĉeestis tiun kunsidon.) Ĝis la mezo de februaro oni nenion scias pri la konkreta enhavo de la kunsido – Károly *Grósz* promesis, ke la membraro de la partio baldaŭ povos ekkoni ĉiujn detalojn. La oficiala komuniko parolas pri „puriga, klariga diskuto". La rezolucio adresas riproĉeton al *Pozsgay* pro la „hasteco" de la intervjuo, sed samtempe „certigas pri sia konfido kamaradon *Pozsgay*". La CK faris decidon ankaŭ pri la publikigo de la plena teksto de la komisiona raporto – kaj tiu decido estis rekordrapide plenumita, ĉar kvin tagojn poste ĝi jam estis ĉie aĉetebla. La CK emfazis, ke ĝi formale ne aprobis la konkludojn de tiu raporto, ĉar estas necese, ke la komisiono laboru plu por precizigi ĝin, kaj eĉ pli necese, ke ĝin pritraktu la tuta membraro de la partio.

La CK-kunsido akceptis la sole eblan kompromisan decidon, ĉar ĉia alia decido – ĉu neta kaj definitiva aprobo de la termino *popola insurekcio*, ĉu firma persistado ĉe la „tradicia" *kontraŭrevolucio* – rezultigus skismon en la partio. Konantoj de la aktuala politika situacio en Hungario tute ne surpriziĝis pro tiu ĉi kompromisa solvo. Estas atentinde, ke la ĝenerala sekretario *Grósz* en sia televida kaj radia intervjuo post la kunsido emfazis, ke ekzistas nenia „Pozsgay-afero" – io tia neniam ekzistis, kaj neniam ekzistos.

Surprizon internacian kaj fakte ankaŭ enlandan kaŭzis la dua rezolucio de la kunsido *pri la enkonduko de la plurpartia politika sistemo* en Hungario. Ja nur antaŭ apenaŭ pli ol duona jaro la partia konferenco rezoluciis, ke „la disvolviĝo de la socialisma plurismo en Hungario devos okazi inter la kondiĉoj de la historie elformiĝinta unupartia politika sistemo". Nun la CK konstatas, ke la spontanea politika evoluo en Hungario transpaŝis tiun rezolucion.

Kvankam en la momento de la kunsido de la CK en Hungario jam ekzistas kaj praktike libere agadas pluraj politikaj partioj aŭ „kvazaŭpartioj", kiuj starigas diversajn postulojn al la registaro, sed ilia influo ŝajnis esti malsufiĉa por atingi tian rezolucion. En tiu ĉi demando Hungara Socialisma Laborista partio faris paŝon kiu ankoraŭ ne estis neevitebla en la momento, kiam la paŝo estis farita. La konsekvencoj de tiu decido



„Apartiĝu la pulmo disde la hepato" – opinias Imre Pozsgay, kies radiointervjuo elvokis akran diskuton en Hungario

en la nuna momento tute ne estas antaŭvideblaj: *pozitivajn* konsekvencojn oni povas atendi en la internacia sfero, antaŭ ĉio en okcidento, tiom pli, ke Miklós *Németh* konfirmis antaŭ okcidentaj ĵurnalistoj, ke „Hungara Socialisma Partio, se ĝi perdos la balotojn en 1990, certe transdonos la potencon al la venkintoj". *Negativaj* konsekvencoj povos aperi antaŭ ĉio en la hejmlanda politiko: tre facile povos okazi, ke la reformkomunista alo iom post iom forlasos la Hungaran Socialisman Laboristan Partion, kaj aliĝos al unu el la nove kreiĝantaj maldekstraj partioj – ĉu al la Socialdemokrata Partio, ĉu al la Hungara Demokrata Forumo. Tiam la relativa pezo de la „fundamentana alo" kreskus, kaj tio kvazaŭ „antaŭgarantius", ke Hungara Socialisma Laborista Partio perdos la balotojn en 1990.

Refleksoj malnovaj kaj malutilaj

En la jam aludita post-kunsida intervjuo partiestro *Grósz* pledis por la popola interpaciĝo pri la pasinteco. Je demando de la raportisto li citis la ekzemplon de Hispanio, kie nun la iamaj batalantoj de la trijara civitana milito interpaciĝis, kaj ĉiuj fiere portas siajn distingojn, sendepende de tio, sur kiu flanko ili ricevis tiujn. Argumentante por la akcepto de la decido de CK, li diris, ke nun fakte CK faris nenion novan, nur ĝi revenis al la *origina* decido de la partio, farita fine de 1956, komence de 1957. Estas unu afero, ke lia argumento ne plene trafas, ĉar post la semajnoj de la perarmila rezistado la Hungara Socialisma Laborista Partio neniam plu uzis la terminon *popola insurekcio* – ĉiuj ĝiaj dokumentoj parolas pri *kontraŭrevolucio*. Kaj kio koncernas la komencajn dokumentojn, inter ili la rezolucion faritan decembre de 1956, oni povas konstati, ke la relative realisma sinteno de tiuj dokumentoj tute ne speguliĝis en la ĉiutaga politika praktiko: la partoprenintojn de la insurekcio trafis senindulgaj punoj: laŭ la raporto de la subkomisiono estis ekzekutitaj ĉ. 300 personoj, do *pli, ol en la kontraŭfaŝismaj procesoj post 1945.*

Sed ne en tio kuŝas la ĉefa problemo. La argumento de *Grósz,* laŭ kiu CK faris nenion novan, nur revenis al la *origina* decido de la partio, rivelas reflekson, kiu akompanas la partion de la hungaraj komunistoj depost 1945. Tiu reflekso estas *troemfazi la konstantecon, la kontinuecon,* por tiamaniere forhuŝi de si la hontigan stampon de *reviziismo.* Interalie tiu reflekso malhelpis al la partio *noviĝi* en 1953, somere de 1956, en 1968. Estas normale, ke ĉiu politika movado volonte serĉas por si legitimacion en la pasinteco, sed en la komunisma movado la pasinteco fariĝis preskaŭ la sola fonto de la legitimacio. Estas vaste konate, ke iu ajn alo de la partio, atinginte gvidpoziciojn, tuj faris ĉion eblan por konkeri la pasintecon, ofte eĉ per reverkado de la partia historio, kaj per la elserĉado de la taŭgaj citaĵoj el la verkaro de Marks kaj Lenin. En la argumentoj de *Grósz* oni povas konstati la reaperon de tiu reflekso, kiu nuntempe estas pli malutila ol ĝi estis iam ajn.

Kio okazis en 1956?

La eventoj de la pasintaj semajnoj pruvis, ke la hungara socio ĝis nun havas la problemaron de 1956 en sia stomako en stato nedigestita. 1956 ankoraŭ ne fariĝis historio – tion pruvas la foje-foje histeriaj reagoj al la vortoj de *Pozsgay*. (Se ne estus tiel, la fundamentanoj devus reagi rifuze al tiuj vortoj de *Pozsgay*, en kiuj li parolis pri tio, ke en la jaroj 1948/49 la hungara socio ekiris sur misa vojo – tiu eldiro ja pridubis la ĝustecon de la tuta kvardekjara periodo, en kiu 1956 estis, kvankam grava, tamen nur unusola ero!)

Kio okazis aŭtune de 1956? Ĉu revolucio, ĉu popola insurekcio, ĉu kontraŭrevolucio? Nuntempe tuta Hungario bruas pro la diskutoj pri tiuj terminoj. La aŭtoro opinias, ke la plej ĝusta termino por tiuj eventoj estas *nacia tragedio*. En tiuj bataloj partoprenis ne herooj kaj perfiduloj, ne venkintoj kaj venkitoj, sed – *viktimoj*, sur ambaŭ flankoj. Ĉiuj mortintoj en la bataloj, ĉiuj ekzekutitoj poste, estis viktimoj de misvojiĝinta politika procezo, kiu ne kapablis eluzi la prezentiĝintajn ŝancojn de la *organika* – seneksploda, sen-perforta – *politika evoluo.* Grava ŝanco por tio estis somere de 1953, kiam la Centra Gvidantaro de la Partio de Hungaraj Laboruloj faris rezolucion, kiu reale analizis la eventojn de la antaŭaj kvar jaroj – sed tiun rezolucion ne povis ekkoni la membraro de la partio, ĉar ĝi publikiĝis la unuan fojon nur en *1986*! La lasta ŝanco estis somere de 1956, kiam la ĝistiama partiestro *Rákosi* estis eksigita, sed la Centra Gvidantaro publike asertis, ke *Rákosi* retiriĝis el sia posteno pro *malboniĝo de la sanstato.* Tiu hipokrita aserto estis „perfektigita" per la fakto, ke la nova ĝenerala sekretario fariĝis Ernő *Gerő*, kiu estis unu el la proksimaj kunlaborantoj de *Rákosi*, kaj sekve partopreninto en ĉiuj krimoj, faritaj de tiu. Kaj okazis ĉio ĉi sub la signo de la „sankta kontinueco". Mi bone scias, ke estas nescience meti en historiaj problemoj la demandon, „Kio okazus, se...?", tamen indas citi ĉi tie la hipotezon de pluraj politologoj, laŭ kiuj la aŭtuna eksplodo estus evitebla, se oni informus la landon pri la eksigo de *Rákosi*, se oni elektus ĝenerala sekretario de la partio János *Kádár*, kaj se la ĉefministran seĝon okupus Imre *Nagy*. Sed tio estas kompreneble nur hipotezoj, kiujn eblas jam nek konfirmi, nek dementi.

En Hungario la enlanda politiko estas malstabila. Oni ne vidas klare la konturojn de la estonto: ĉu Hungara Socialisma Laborista Partio kapablos novigi sin mem kaj trovi la vojon al harmonie funkcianta koalicio kun la naskiĝintaj kaj naskiĝontaj novaj partioj; ĉu tiuj novaj partioj komprenos, ke Hungara Socialisma Laborista Partio ne estas eliminebla el la potenco de unu tago al la alia; ĉu atendas la landon kaoso aŭ novtipa kunlaboro inter la diversaj tavoloj de la socio? Ĉiukaze, nun ĉio ŝanĝiĝas, inkluzive la homojn. Iamaj ĝisostaj stalinistoj fariĝas bruaj reformemuloj. Kiel sprite rimarkis populara hungara verkisto: sur la vojo al Damasko nun estas granda tumulto...

Vilmos *Benczik*



HUNGARA POLITIKA KALEJDOSKOPO

„Alternativaj" organizaĵoj

Dum la lastaj jaroj en Hungario aperis pluraj organizaĵoj, kiujn oni nomas „alternativaj", ĉar ili kreiĝis ne laŭ la iniciato de la ŝtata aŭ partia potenco, kaj estas sendependaj de tiuj. Laŭ lastaempe kompilita katalogo jam ekzistas pluraj dekoj da ili, kun tre diferencaj politikaj starpunktoj. Tamen, relative klare distingeblas tri ĉefaj tendencoj, nome: 1. Unuiĝoj de intelektuloj, esence kun politike maldekstra pensaro, tamen kun nacia-popola bazo. 2. Organizaĵoj, kiuj havas ideologion tipe radikal-burĝan. 3. Grupoj de ekologiistoj.

La unuaj du tendencoj principe okupiĝas pri ĉiuj sociaj problemoj, dum la ekologiistoj limigas sin al la ekologiaj problemoj, tamen ne ignorante ankaŭ ties socipolitikajn aspektojn. (Ili verve batalas por la ĉesigo de la giganta Danuba hidrocentralo Nagymaros-Gabĉikovo, argumentante ne nur laŭ ekologiaj vidpunktoj, sed atentigante ankaŭ pri ekonomiaj sekvoj – „ĉu estas racie elspezi enormajn sumojn por tiel dubinda afero?" –, kaj same pri politikaj aspektoj: „ĉu la ŝtato rajtas startigi tiel grandsignifan projekton sen demandi la popolon?")

La plej signifa el tiuj organizaĵoj estas *Hungara Demokrata Forumo*, kiu fondiĝis aŭtune de 1987. Ĝi jam ne plu neas, ke ĝi volas fariĝi politika partio. Ĝia membraro jam estas ĉ. 12 miloj. Esence ĝi apartenas al la tendenco n-ro 1. Fine de marto de 1989 ĝi havos sian unuan kongreson, tiam ĝi decidos, ĉu fariĝi partio aŭ ne, kaj tiam estos akceptita ankaŭ ĝia definitiva programo. Ĝis la nuna momento ĝi ne kontraŭas, ke ĝiaj membroj estu anoj en aliaj politikaj organizaĵoj, inkluzive en la Hungara Socialisma Laborista Partio.

Alia grava organizaĵo estas *Asocio de Junaj Demokratoj*, kiu fondiĝis fine de marto 1988. Fine de tiu sama jaro ĝi havis 1600 membrojn. La ŝtataj aŭtoritatoj – ĉefe komence – rilatis al ĝi malamike, la polico ne malofte molestis ĝiajn membrojn kaj kunvenojn. Laŭ politika tendenco tiu ĉi *Asocio* klasifikeblas en la tendenco n-ro 2. Ĝi unuigas tiun parton de la junularo – ĉefe studentojn kaj junajn intelektulojn –, kiu estas esence malkontenta pri la funkciado de la „ekzistanta socialismo".

Speciala forumo – fakte ne organizaĵo – estas la *Nova Marta Fronto*, en kiu partopenas elitaj intelektuloj kun popolfronte bunta politika idearo. La celo de la *Fronto* estas atentigi la gvidantojn de la lando kaj la socion pri la kernaj problemoj de Hungario, kaj fari proponojn por ties solvo. *Nova Marta Fronto* ne varbas novajn membrojn, ĝi entute ne deziras havi vastan membraron. Estas atentinde, ke en ĝi partoprenas ankaŭ Rezső *Nyers*, membro de la Politburoo de Hungara Socialisma Laborista Partio.

Ekzistas ankoraŭ multaj alternativaj organizaĵoj, kaj povas esti, ke ĉe la publikiĝo de la supra prezento iuj ne prezentitaj ĉi tie jam estos pli signifaj ol la nun priskribitaj tri.

Renaskiĝo de historiaj partioj

Renaskiĝas ankaŭ historiaj partioj, kiuj en 1949 devis ĉesigi sian agadon, eĉ sen formala malpermeso. La plimulto el ili aŭtune de 1956 rekomencis sian agadon, sed tio eblis nur por kelkaj tagoj. Nun ŝajne ĉiuj provos aperi en la politika areno.

Hungara Popolpartio estas posteulo de la *Nacia Kamparana Partio,* kiu fine de la kvardekaj jaroj partoprenis en maldekstra koalicio kune kun *Hungara Komunista Partio.* Ĝi celas esti esence *agrara* partio, koncentrante sian atenton al la necesaj reformoj en la hungara agrara politiko.

La *Partio de Sendependaj Etbienuloj* estis la plej forta partio de la postmilita koalicia periodo. Ĝia socia bazo estis ne nur la vilaĝaj etposedantoj, sed ankaŭ la urba etburĝaro. Pluraj el ĝiaj iamaj membroj fariĝis membroj de Hungara Socialisma Laborista Partio, aŭ kiel ne-partianoj tamen subtenis la politikon de la komunistoj dum la lastaj jardekoj. Signifa nombro da ili nuntempe troviĝas en la gvidaj organoj de la Patriota Popolfronto, sed ŝajne tiuj iamaj membroj ne montras interesiĝon al la renaskiĝo de sia iama partio. Kiam mi tajpas ĉi tiujn liniojn (meze de februaro) ankoraŭ ne klaras, kian programon havos la renaskiĝinta partio, kaj eĉ malpli tio, pri kiagrada socia subteno ĝi povos kalkuli.

Dum la supraj du partioj esence povas aserti, ke ili neniam estis leĝe malpermesitaj, *Hungarlanda Socialdemokrata Partio* fakte ĉesis ekzisti, ĉar siatempe ĝi unuiĝis kun *Hungara Komunista Partio* – el tiu unuiĝo naskiĝis la *Partio de Hungaraj Laboruloj,* ekzistinta ĝis 1956. (La nunaj refondintoj de la *Socialdemokrata Partio* rigardas tiun unuiĝon nevalida, ĉar, kiel ili asertas – cetere ne malprave – tiu unuiĝo okazis sub premo de perforto.) *Hungarlanda Socialdemokrata Partio* esence startis nur komence de januaro 1989, kaj dum nuraj kvin semajnoj ĝi jam akiris ĉ. 14.000 membrojn. La surprize sukcesa starto ŝuldiĝas veršajne al la politike genia gesto, ke oni invitis fariĝi ĝenerala sekretario politologon Mihály *Bihari*, unu el la kvar reformkomunistoj, kiuj aprile de 1988 estis eksigitaj el *Hungara Socialisma Laborista Partio. Bihari* estas tre populara teoriulo en Hungario, li havas minimume plurdekmilan adeptaron ankaŭ inter la membroj de *Hungara Socialisma Laborista Partio,* kaj estas ne maleble, ke granda parto de tiu adeptaro sekvos lin en la *Socialdemokratian Partion*.

Hungara Socialisma Laborista Partio – ĉu unu partio?

La supra demando ĉiam pli ofte lanĉiĝas en politikaj diskutoj, kaj la respondo al ĝi plej ofte estas *nea*. En politika sistemo, kie ekzistas nur unusola partio, fakte tio es-

tas fenomeno tute normala, ja politike aktivaj homoj malfacile povis trovi por si eblon de politika agado ekster la partio. Kiel estas eksplikite en la artikolo pri la lastaj rezolucioj de CK, ene de tiu ĉi partio – havanta ĉ. 800 mil membrojn, t.e. ĉ. 13% de la plenkreska loĝantaro – klare distingeblas minimume tri tendencoj. *Fundamentanoj* konsistigas ĉ. unu trionon de la membraro (granda parto de tiuj estas relative aĝaj homoj), *centro* (kompreneble ankaŭ tiu ĉi „centro" montras certan heterogenecon) ampleksas ĉ. la duonon de la partio, kaj la *reformkomunista alo* konsistas el unu sesono de la membraro.

La kompromisa decido komence de februaro provizore konservis la unuecon de la partio, kaj eble kontribuos al tio ankaŭ la enkondukota ‚platform-libereco". Tamen, oni ne certas, ĉu la konservo de la unueco de tiel heterogena partio estas entute utila, ĉar ĝis nun almenaŭ la diverstendencaj fortoj interne de la partio sufiĉis nur por estingi unu la alian, kaj pro tio la tuto de la partio restis fakte senmova kaj senpova, la gvidantoj daŭre devis serĉi la ekvilibron inter la diversaj tendencoj. Restas nerespondita kaj momente nerespondebla la demando, kio okazos, se la reformkomunista alo grandparte forlasos la partion?

Kion faras la registaro?

Ĝi estas plene okupita pri la konstanta altigado de la prezoj – respondus nuntempe ĉiu hungara civitano la supran demandon. Kaj estas tiel: la nova ĉefministro dum nuraj kvin semajnoj sukcesis altigi ĉiujn prezojn, escepte tiujn de kafo kaj cigaredoj. Oni enkondukis pluajn liberaligojn en la vojaĝado al eksterlando – kaj nuntempe hungaroj vojaĝas al iu ajn lando tiel same libere, kiel civitanoj de ajna lando en Okcidenta Eŭropo, kondiĉe ke ili posedas por tio eksterlandan (okcidentan) valuton. (Orientajn valutojn la hungara ŝtato vendas al siaj civitanoj sen ajna limigo.) Por ne diri nur malicaĵojn, estas nepre agnoskinde, ke la registaro klopodas fari sian eblon por allogi al Hungario la eksterlandan funkciantan kapitalon – sen tio ja ne eblas eliro el la nuna ekonomia krizo. Kaj tempon la registaro havas nur malmulte. Ekde la jaro 1991 grave kreskos la jare repagenda sumo al la eksterlandaj kreditoroj: en la nuna momento oni ne scias, ĉu la hungara ekonomio kapablos produkti sufiĉe da bonkvalitaj, ĉie vendeblaj varoj ĝis tiam. Necesas ankaŭ malkreskigi la deficiton de la ŝtata buĝeto; oni malpliigis lastatempe eĉ la financan subtenon kiun ricevas Hungara Socialisma Laborista Partio, por ne paroli pri aliaj sociaj organizaĵoj. Ŝrumpis ankaŭ la ŝtata subvenciado al la sanitaraj servoj kaj la instruado, kvankam tiuj jam delonge ricevadas nur tre avarajn porcietojn el la nacia „torto". Eĉ la Ministerio pri Defendo devis rezigni pri certa sumo – tamen la atingo de ia ekvilibro estas nur hipoteza.

Sindikatoj ribelas

Dum la lastaj monatoj kreiĝis pluraj sendependaj sindikatoj, kiuj muelas sufiĉe da pipro sub la nazon de la registaro. Sed fakte la samon faras ankaŭ la t.n. „oficialaj sindikatoj", apartenantaj al la Nacia Konsilio de Sindikatoj, ĉar ili riskus perdi siajn membrojn, se ili „glutus" sen rimarko la ĝeneralan prezaltigon, kiu dum kelkaj semajnoj altigis la preznivelon je ĉ. 12-13%. (Pasintjare laŭ registaraj kalkuloj – vaste pridubataj – la altiĝo de la prezoj dum la tuta jaro estis entute 15,7%.) La registaro preparas leĝprojekton pri strikoj; la sindikatoj trovas tiun projekton neakceptebla, ĉar ĝi permesus striki nur kontraŭ la entreprena gvidantaro, sed ne kontraŭ la registaro. La sindikatoj rifuzas tiun limigon, argumentante, ke en lando, kie la efektiva dunganto/mastro por ĉ. 90% de la laborlokoj estas la ŝtato, t.e. la registaro, sonas absurde malpermesi striki kontraŭ la registaro. Tute ne maleblas, ke baldaŭ oni spertos strikojn, iniciatitajn de la oficialaj sindikatoj, kvankam ties gvidantaro ĝis nun montras paciencan sintenon.

Preparo de nova konstitucio

Jam antaŭ monatoj komenciĝis la preparoj por ellabori novan konstitucion por Hungario. La nuna konstitucio, farita en la jaro 1949 surbaze de la Stalina konstitucio de la jaro 1937, kaj modifita dum la sepdekaj jaroj, sonas plie politika manifesto ol baza leĝo. La estontan konstitucion ellaboras juristoj kaj ne politikistoj, tamen ĝiaj bazaj trajtoj devos konturiĝi rezulte de politikaj diskutoj. La diskutado okazas vaste, ĝin partoprenas aktive ankaŭ la opoziciaj fortoj. Unu el la kernaj politikaj problemoj estas tio, ĉu la konstitucio enhavu difinon pri la socia ordo de Hungario? Károly *Grósz* opinias, ke tia paragrafo nepre devos inkluziviĝi; la eksigita komunisto Mihály *Bihari*, ĝenerala sekretario de la refondiĝinta Socialdemokrata Partio povas akcepti tion nur en formulo de celdifino, iel tiel: „Hungario celas la realigon de demokratia socialismo..."

La projekto de la nova konstitucio antaŭvidas la enkondukon de *prezidenta* posteno, anstataŭ la ĝis nun (mis)funkcianta Prezidio. Krome oni antaŭvidas ankaŭ la ŝanĝon de la nuna blazono, servinta dum tridek jaroj. La nova blazono estos fakte malnova: oni diskutas pri la denova adopto de unu el la variantoj de la hungara historia blazono, kiun oni forigis en 1949.

Eĥoj ĉe la aliancanoj

Oni ne povas eviti la demandon, kiel reagas al la Hungarlandaj ŝanĝoj la aliancanoj? Tio ne estas neglektebla problemo, ĉar dum la pasintaj jardekoj plurfoje okazis, ke hungaraj reformaj pensoj sufokiĝis pro la malaprobo fare de la aliancanoj. (Kvankam la tezo veras ankaŭ inverse: ne malofte reformoj formortis dank' al hungaraj ortodoksuloj, kiuj en sia kontraŭreforma agado konstante referencis al nur *supozata* malaprobo ekstera.)

Nun la eĥoj estas diversaj. La hungaraj reformojn en Bukureŝto oni rekte kondamnas, el Berlino rigardas kun kuntiritaj brovoj, en Prago kaj Sofio diras nenion sed la neeldiritaj rezervoj estas klare senteblaj. Varsovio rigardas al Budapeŝto kun simpatio, kiel plej ofte tio okazis dum la historio. Kaj kio en Moskvo? – ja oni bone scias, ke pleje gravas la Moskva reago. Nu, ŝajnas ke ankaŭ tie ĉio estas en ordo, Sovetio estas por la sukceso de la hungaraj reformprovoj. Meze de februaro la soveta ekonomikisto-akademiano Oleg Bogomolov donis intervjuon al kelkaj okcidentaj ĵurnaloj, kaj li deklaris, ke Sovetio ne kontraŭus, se en Hungario la ekonomio kaj la politiko evoluus simile al la sveda aŭ aŭstra modelo, kaj, ke la sekurecon de Sovetio ne influus negative, se Hungario fariĝus politike neŭtrala lando.

Nu, pri la unua parto de lia eldiro mi konsentas: verŝajne Sovetion tute ne ĝenus, se la hungara interna politiko alprenus certajn kapitalismajn trajtojn, se per tio oni povas eviti politikan krizon kaj eble eksplodon. Tamen, pri la dua parto de lia aserto mi havas fortajn dubojn. Mi ne povas imagi, almenaŭ ne en la nuna momento, ke Sovetio povus toleri eliĝon de Hungario el la Varsovia Pak-

to. Unue tial, ĉar tio povus esti *precedenco* nedezirata, kaj due, ĉar Hungario kiel membro de la Varsovia Pakto efektive estas konsistiga ero – eĉ se tre malgranda – de tre delikata internacia ekvilibro. Krome, la eksiĝo de Hungario el la Varsovia Pakto povus tre forte ŝarĝi la konton de la *perestrojko* en la sovetia enlanda politiko. Oni memoru nur la aŭtunon de 1956, kiam la eksiĝo de Hungario el la Varsovia Pakto provokis intervenon de la soveta armeo; verŝajne tiu evento ne malmulte kontribuis ankaŭ al la plifortiĝo de la ortodoksa linio en la soveta partio, antaŭ kiu la reformemo de Hruŝĉov devis retiriĝi. Tiusence la vortoj de Bogomolov – kiujn oni neniel povas akcepti kiel oficialan sovetan opinion – povus servi en Hungario kiel bazo de riskoplenaj agoj. Feliĉe la respondecaj gvidantoj de opoziciaj fortoj – inter ili Mihály *Bihari* – trovas, ke en la nuna momento la aparteno de Hungario al la Varsovia Pakto ne kaŭzas kernan problemon, do preferindas ne tuŝi tiun temon.

Verŝajne la aserto de Bogomolov povos esti prava post kelkaj jaroj, se la reciproka malarmado de Usono kaj Sovetio plumarŝos en kontentiga ritmo.

Eĥoj en okcidento

La eĥoj en okcidento estas ĝenerale favoraj, tamen la subteno plejparte konkretiĝas nur en deklaroj. La okcidentaj landoj ĝis nun ne donis signifan helpon por sanigi la hungaran ekonomion, kaj dum longaj monatoj mankis eĉ politika subteno en nia diskuto kun Rumanio, kvankam estas evidente, ke la Rumania reĝimo nete kontraŭas al la okcidentaj principoj pri homaj rajtoj kaj demokratio. Tamen, en okcidento oni sufiĉe longe hezitis eldiri ion kontraŭ la rumana enlanda politiko, verŝajne pro la jena dilemo: ĉu indas kritiki la „Grandan Kondukiston", kiu jam kaŭzis kaj kaŭzas tiel multe da ĉagrenoj al Moskvo? Okcidenta Germanio klopodis en plena silento aĉeti de Ceausescu kontraŭ miloj da markoj siajn kelkajn dekmilojn da saksoj kaj ŝvaboj – sed kiel la malriĉa Hungario aĉetu du milionojn da suferantaj hungaroj, por ne paroli pri la milionoj da suferantaj rumanoj, kiujn volas aĉeti neniu, ili eĉ fuĝi povas nenien...

La „fenomeno Pozsgay"

Verŝajne unu el la plej multe konataj hungaraj politikistoj nuntempaj estas Imre *Pozsgay*. Multaj jam eĉ parolas pri „Pozsgay-fenomeno", kaj ne tute senbaze.

Kiu do estas Imre *Pozsgay*? Li naskiĝis en la jaro 1933, en kamparana familio. Lia kariero komenciĝis tiel same, kiel tiu de multaj partiaj kadruloj. Li akiris diplomon dum la kvindekaj jaroj en la Budapeŝta Lenin-Instituto, poste fariĝis direktoro de partia lernejo en la urbo Kecskemét. Poste li eklaboris en la departementa partia aparato, poste dum unu jaro en la aparato de la CK. Meze de la sepdekaj jaroj li estis vic-ĉefredaktoro de la teoria revuo de la partio. Inter 1976-82 li estis ministro pri kulturo, respektive pri klerigo. En 1982 li havis fortan diskuton kun György *Aczél*, kiu estis direktanto de la tiama partia kulturpolitiko, kaj proksimulo de *Kádár*. Rezulte de la diskuto *Pozsgay* post kelkaj horoj jam ne plu estis ministro, sed ĝenerala sekretario de la Patriota Popolfronto – movado sen ajna politika pezo tiutempe.

Post kelka hezito *Pozsgay* eklaboris laŭ la principo „ne la posteno glorigas personon, sed persono la postenon". Per siaj klereco (li akiris la titolon „kadidato de la filozofiaj sciencoj" en Moskvo), politika takto, bonega kapablo kontakti homojn li fariĝis nepre la plej ŝatata politikisto de la hungara intelektularo. Li estas bona oratoro, parolas kun prononco iomete kamparaneca (dialekta) sed en tre klere kaj bonstile konstruitaj frazoj. Havante vastajn konojn pri sociologio kaj filozofio, li tamen konservis la sanan rezonmetodon kamparanan, pro tio eĉ la plej komplikajn tezojn li kapablas disvolvi en lingva formo komprenebla por ĉiuj. Havante la bonŝancon koni lin persone, mi trovas lia plej alloga trajto, ke per la konservo de la saña kamparana rezonmetodo li evitis sklaviĝi al teorioj kaj ideologioj – kiel tio ofte okazas ĉe bolŝevikaj gvidantoj, kaj ankaŭ ofte ĉe ĉiaspecaj intelektuloj. En lia personeco, malgraŭ la posedata politika lerteco kaj praktikismo, restas forta komponento la etika faktoro – fenomeno ne tre ofta ĉe politikistoj.

En la nuna momento li estas la plej populara hungara politikisto en intelektulaj rondoj, sed li havas adeptojn en ĉiuj tavoloj de la loĝantaro. Por la opoziciaj fortoj li ŝajnas esti la plej akceptebla komunista politikisto. Verŝajne pravas tiuj, kiuj antaŭvidas, ke inter la komunistaj politikistoj estas li, kiu havas plej multe da ŝanco elektiĝi kiel prezidento de Hungario.

Rifuĝintoj el Transilvanio

Jam la tuta mondo scias pri la Rumaniaj planoj detrui ĉ. duonon de la ekzistantaj vilaĝoj. Tiuj planoj minacas plej multe la ĉ. dumilionan hungaran minoritaton, vivantan en Rumanio.

Pro tiuj planoj, pro la neglekto de la rajtoj de la naciaj minoritatoj, kaj ne laste pro la forta politika subpremo depost kelkaj jaroj daŭre venas rifuĝintoj el Rumanio al Hungario – ili plejparte estas hungaroj, sed troviĝas inter ili ankaŭ rumanoj. Komence de 1989 vivis en Hungario jam pli ol 13 mil rifuĝintoj.

La hungaraj aŭtoritatoj longe prisilentis tiun fenomenon. Dum longa tempo la plimulton de la rifuĝintoj oni redonis al la rumana limpolico. Eĉ dum la pasinta jaro la proporcio de la resenditoj estis ĉ. la duono de la rifuĝintoj, kaj nur sekve de forta civitana protesto tiu proporcio ŝrumpis ĝis kvarono.

Kiel la hungara socio akceptas la rifuĝintojn? Ĝenerale kun profunda simpatio kaj kompato. Oni devas diri, ke dum la pasinta jaro nur dank' al la rifuĝintoj ne malkreskis la hungara loĝantaro. Tamen, se la nombro grave plialtiĝos, povos kreiĝi sociaj streĉitecoj, ĉar ankaŭ en Hungario aperis *senlaboreco* – en la nuna momento ekzistas 17.000 senlaboruloj –, kaj centmiloj da hungaroj ne havas propran loĝejon. Oni ne bezonas esti aŭguristo por antaŭdiri, ke rifuĝintoj baldaŭ povos aperi kiel nova ero sur la listo de la Hungarlandaj sociaj problemoj.

Vilmos *Benczik*



MORTIS LA POETO...

Sándor Weöres (1913-1989)

La 22an de januaro post plurjara grava malsano forpasis – laŭ la vortoj de lia edzino, poetino Amy Károlyi, „hejmeniris" – unu el la plej grandaj Hungaraj poetoj, Sándor Weöres [Ŝandor vörös].

Kiu li estis, kia li estis? Kiel 15-jara knabo li aperis en la Hungara poezio. Mirakla infano, kiu ĝismorte restis miraklo. Poeto, kiu ĝisoste estis poeto. Li sciis, kie, en kia mondo, en kia lando li vivas, bonege konis la cirkonstancojn eĉ en la literatura vivo; neniam li sendis poemon al revuo, kie tiu ne povis aperi. Tamen, en la verkoj de Weöres neniun rektan aludon oni trovas pri la aktuala politiko. Sian opinion pri la mondo li diris per sia poezio.

Mi memoras la komencon de la 60aj jaroj, kiam aperis lia *Antikva Eklogo*. Per tiu erotika verko rompiĝis multe da tabuoj, pri kiuj hodiaŭ jam ĉiu nur miras senkomprene. Kaj la sama poeto verkis la filozofiajn poemojn pri la plej profundaj problemoj de la ekzisto. Li aŭtoris la dramojn, kiuj tre malfacile trovis vojon al la teatroj de Hungario. Parte pro la skeptikismo, esprimata en ili, kiu laŭ politika vidpunkto estis konsiderata problema, parte pro la komplikeco de ilia agado, kiu el scenoteknika vidpunkto ŝajnis malfacila (ne parolante jam pri la malfavora sinteno de la Hungara publiko al similaj pecoj).

Tamen, en la 70aj jaroj unu verko de Sándor Weöres rikoltis furoran sukceson. Temas pri Psiĥa (Psyché). Aperis belegaj versaĵoj de poetino, duone Cigana, duene aristokrata, image vivinta en la komenco de la 19a jarcento. Tiuj sporadaj eroj iom post iom formiĝis cikloj, aperis biografio, taglibro, prozaj rememoroj fare de ŝi. Estiĝis siaspeca poezia romano, kun herooj parte vivintaj, parte imagitaj, kun brilega elmontro de la epoko kaj tiu de la homa psiko. Ludo, vero, arto – belo.

En la ekzemplo de tiu ĉi verko montriĝas la ĉefa trajto de la Weöres-a verkaro: li ne akceptis la rolon de la politika poeto, tiel kutima en Orienta Eŭropo; li eĉ ne volis formi el si iun „lirikan heroon" – klare difineblan personecon, ĉirkaŭ kiu kristaliĝas lia poezio. Inverse: en liaj verkoj montriĝas ĉiam alia personeco, sed ĉiukaze kun la same senpera intimo: facetoj de la homa psiko.

La unueco de la formo kaj enhavo – postulo, ripetita multfoje sen vera kompreno – ĉe Sándor Weöres ĉiam ekzistis. En liaj poemoj la ritmo kaj la muziko aperas kune kun la direndo, neapartigeble. Ĉu li estis „poeta doctus" – dokta (multescia) poeto? Jes, li diplomiĝis, eĉ doktoriĝis per diserto pri la poezio, sed oni povus lin nomi nekutime „poeta technicus", ĉar eble neniu ĝis nun posedis je tiel alta grado la lingvon Hungaran, kaj konis tiel profunde la eblojn de la ĉi-lingva versfarado. Tiuj kapabloj ebligis al li fari enorman kvanton da tradukaĵoj el la Mondliteraturo. Temas ne nur pri Eŭropa, Nord- kaj Sud-Amerika, sed ankaŭ pri Hindia kaj Ĉina literaturoj. Fiero de la Hungara lingvo, ke Weöres tute formofidele povis traduki la versojn de la klasika Hinda poeto Ĝajadeva; sed por tio la verko bezonis ĝuste lin, kiu tiel perfekte sentis la eblojn de la idiomo gepatra.

Tiu ĉi perfekteco karakterizas la plej popularan parton de la Weöres-a poezio, la „porinfanaĵojn". La citiloj staras konscie, li ja neniam dividis la poezion je „poradolta" kaj „porinfana" partoj. El liaj poemoj nur estas pluraj, kiujn komprenas, pli precize, ĝuas *ankaŭ* la homoj, aĝantaj 2, 3, 4, 5 jarojn. La miraklo estas, ke ne nur ili. Ĉiu, kiu havas inklinon al la poezio, same plezure legas ilin. Al multaj el tiuj poemoj estas farita muziko, ofte eĉ pluraj melodioj de diversaj aŭtoroj. En la radio, televido, sur sonbendoj, sondiskoj multfoje sonas la versoj de Weöres kun muziko. Kaj la infanoj kun la gepatroj kune kantas ilin. Kiom da homoj en Hungarlando ekamis la poezion pere de verkoj de Sándor Weöres! Eble li estas la poeto, kies plej multe da versoj scias parkere la Hungaroj.

Kia perdo, ke li mortis... Kia feliĉo, ke li vivis!

Péter András *Rados*

***

Morti

Odor' de cidoni', rigardo perlamota,
la voĉ' de sonoril', de violon' tuŝota,
je l' are kaj hezite tumultantaj paŝ-eroj
ekhurlas, sternas sin multkornaj spac-ĝemeloj,
descendas frosto kaj inundas bluo ĉion!

Inundas blua tir', plugil' glimanta dion,
super urtikoj flamaj tempesto de l' Nudulo
sulkige sternas sin al ceda terobulo,
ektremas nesto de l' dolĉeco: plado vanta,
kaj flugas ĝi al lum' senmove disfluanta.

El la hungara: Vilmos *Benczik*

El „Ĉifontapiŝo"

33

La ŝton-bufo paŝis plu.
La ŝton-bufo paŝis plu.
La noktmez' senharigitis,
la aŭror' senhaŭtigitis.
La ŝton-bufo paŝis plu.

47

Ĉuje, ĉuĉuje, rozo,
ĉuĉuje, malvo!

Lun-luman vojon,
stel-kovritan vojon,
hundparo campas,
ŝtonan, ventan vojon.

Ĉuje, ĉuĉuje, rozo,
ĉuĉuje, malvo!

La grandnaza hundo diras:
Kiel fartas roz-odor'?
La hund' grandorela diras:
Kiel fartas malv-kolor'?
Rozo-flor', malvo-flor'
perlon bluan ensilkigas,
dum dormeto mildas kor'.

Ĉuje, ĉuĉuje, rozo,
ĉuĉuje, malvo!

52

Tra herboj, sciu, promenas heliko
mia, tutnokte: piemul' tra kirko.

Kial silentas la sambuka flor',
dum tintas riveret': ĝi scias nur.

Se ĝi abundus je mon' kaj distingoj,
ĝin en kapel' ĉirkaŭus kandelingoj,

sed ĝia sorto estas sen makul':
nur heliket' ĝi estas, ne gravul'.

Amuleto

Kion mi timu? Ne estas sufer',
kiun mi kaŝe sen ĉes' ne entenis.
Kaj eĉ l' inferon por etern' elportas,
kiu ĉi alvenis.

Kantoj el Na Conxy Pan

1

Kien vi, glavoj de l' trioblaj akroj,
kun kiu vento luktadas vi arde,
kion vi volas en ĉi mond' sen markoj,
dum Laktovoj' sonoras streĉit-korde?

6

La poet-princ' atendis min mondpinte
kun kvar virinoj, portantoj de l' koro
sur mast'. La bluajn velojn ekvidinte
ĉiuj ploregis kune ĝis aŭroro.

8

Du-kapa kaj tri-fingra — tiom restis —
mi devis vagi en algaro densa.
Kaj en ĉi mondo lok' nenia estis
por mia ĝemo, al vi frat-parenca.

13

Aŭror', tra mond' ŝipanta pura onjo,
taseton da miel' al mi prezentu
kaj mi permesos por favor-redono,
ke mian ombron sur monteg' etendu.

14

En spaco radi-milo sin renkontas
kaj kaldron-funde mil mirigaj sorĉoj,
al sem' frat-miloj en garbej' respondas.
Neniam renkontiĝas nur la steloj.

15

Se fringeliĝus vi — tio pensigas
nun min — ĉu portus vi je fest' avelon
por mi? kaj se l' aŭtun' surmontetiĝas,
kratagon kaj agacajn prunelberojn?

Tradukis: Adalberto *Huleŝ*

Aŭtuna zumo

Jam forflagris azur' de l' sovaĝflama kant':
Krakas fole la vent' sub senigita bosk'.
Post arĝ enta filandro
flugas vile la brila temp'.

Plenas bon' ĉe rigard' de l' skarabeta flirt'
el trans raba torent', dum nenifara hor'
Ja min gasti vi vokis;
kial dev' de forir', ho Sun'?

En bril' de l' kolonar' via-atende mi
sidus, dum ĝia greg' fuĝu de pala mort',
kaj kisus la tremantajn
manojn de l' donacit' de vi.

DEXTRA KAJ MALA
(El „Psiĥa")

Nymphet' al Faun': „Hen unu
Orel' sonoras al mi.
Azenorelon wian
Mi por diweno kisos."
La Faun', ja freŝa bub' nur,
Ruĝiĝis ĝiskornette:
Mi diru tinti la dextran
Persistos wi pri mala,
Kaj diru mi la malan,
Wi ĵuros dextran esti:
Ol ridu min, mi mutas."
Kompatis lin la Nympho:
„Ne prenos win mi dupon,
Nu wenu, hen por ambau
Oreloj kis' sen-page."
Sed la timul' ne kredis
Al bella dezirinda,
Qe tiu lin faworus.
Mal-kredo kaj deziro
Lin mordis dextre-male,
Tra arboj sin li ŝtelis,
En ĉagren' por l' mal-feliĉo.

Minetto, kurio Bell-mont, en somero de 1812.*

Traŭukis: Adalberto *Huleŝ*

* La poemo estas ero de la poemaro de iama imagita nobela fraŭlino. Ĉe la interpretado de tiu ĉi feina ludo de la poeto apartan malfacilaĵon kaŭzis la redono de la iom arkaika lingvo kaj ortografio. Tiucele mi uzis kelkajn strukturojn iomete latinecajn kaj la pseŭdo-arkaikan ortografion.

La Feino

Bela Bobela jen dancas,
rondo anĝela ŝin zonas,
ran-regimento flutetas,
grilo-brigad' violonas.

Bela Bobela petolas,
sorĉas flugila porkidon,
kisopromese ĝin rajdas,
fine donacas mokridon.

Bela Bobela masonas
el nebulkirlo palacon,
en ĝi regalas ŝi nanajn
gereĝidetojn, pajacon.

Bela Bobela nun dormas
jam sur aŭtuna folio,
par' de helikoj gardadas
pri ŝia sonĝ-idilio.

Serenado de Johaĉjo, la Pupo

Krispa la lag' pro la blov' de zefir',
perlas lum-ilumino,
flugas birdete al vi la suspir',
dormi en dolĉo de l' sino.
Tremas en brust' aperta la stup',
pro vi ploras Johaĉjo, la pup'.

Vundas ĉielon vi per okulpar',
vidu stelvojon, la vundan.
Por mi sufiĉas bukl' el harar'
pansi la vundon profundan.
Falas segaĵo, pluvas la stup',
plu ne estos Johaĉjo, la pup'.

Via spegulo estas la lun',
lipe krepuskoj ekbrulas,
dum mi malgajas ĝis frenezum',
kaj al vi trubaduras:
Brulos en mi la koro el stup',
pro vi mortos Johaĉjo, la pup'.

Tradukis: Kálmán *Kalocsay*

Kruc-stebo

dika	*rano*	*lage*	*dancas*
ombro	*tremas*	*arbo*	*branĉe*
stelo	*apud*	*maro*	*verda*
ŝaŭma	*floro*	*nuba*	*tulo*

Tradukis: Péter András *Rados*

Adalberto Kulêŝ

UNU SOLA KANDELO

Funebro kun grimaco **89/01/21 15^{h}**

La grimaco de l' televido!
Antaŭ minuto mi aŭdis — apenaŭ
mi transiris por rakonti ĝin al mia edzino —
ĉi tie en mia loĝejo en Budapeŝto, oni diris tra rekta
linio el Madrido, ke Dalí agonias, tie, sinkrone.

Tiom mi aŭdis en la hungara televido, kaj dume
mi scias, ke Sándor Weöres estas en komato nereturnebla,
ĉi tie, en Budapeŝto, tute ne el la televido,
tio estas ĉi tie profunda sekreto; grimaco duobla.

Devis veni al mi en la kapon
— ja mi skribis eĉ versaĵon pri ĝi — kiam
mi aŭskultis en radio, ke la mortadanta Cocteau
adiaŭis Edith Piaf-on en la franca radio.

Tiam mortis Eŭropo.

la delirema infano

patrin' lian kapon katoj dronintaj rul-
adas patrin' sur lia tron' ciganoj inter-
amoras patrin'

sur lia maldekstra man' li havas dekduon
da fingroj en lia dekstra jen vosto de rato
orelo de bovlo kaj la ŝtonpupo patrin'

patrin' sur lia ventro dancas la junedzin'
la junedzin' kun la inversa nuptofraŭlo liaj
piedoj konstante puŝadas li volas naskiĝi

patrin' li min manĝas min voras ho kia buŝ'
marŝas en ĝin regiment' blupeltaĵa kune
kun ĉeftamburisto patrin'

89/01/23

du bagateloj

estimendaj gravmienaj uloj vi el ajna ord'
mi post aĵ' abunde bela malaperas trans la pord'
pasto bela restu por vi mi sendistingul' en l' alt'
plumbarmeon ekzercadas marŝ kaj halt kaj marŝ kaj halt

*

ĉesas gesti mi post nun zorg' pri la regno neniam
plene obsedis min zorg' pri mi same ne ĝin
por brasikaĵo-vorantoj vantis ofer' ĉokolada
nur l' infana okul' miras pri l' staniol'



Éva Jóba: Tristo

István Béládi
(1960—1986)

Unu morto

„De tiam mi nur rakontas al vi (al Mi): ...Pri eksreĝoj, malgajajn rakontojn."

Unu homo, se li estas tia, estos ĉiam sola.

Unu homo, unu tago, cent mortoj. Ĉu li pravas, ĉu ne, tio estas malgrava. Oni taksas nek honeston, nek amikecon, nek amon. Oni taksas nenion, vivo estas la morto mem. Ne estas valoroj, estas nenio, veraj estas nur naturo, falkoj, ĉevaloj, akvo, odoro de vento. *Solitus solus eris.* Tiel estas, la cetero estas ŝajno, ludo. Pri nenio, pro nenio.

Unu homo.

Kiam li ekvidis tiun, tiu venis jam proksime. Vid-al-vide li proksimiĝis, per longaj, rektaj paŝoj, malantaŭ li kunfluis la ebeno. Sin apogante al arbo li sidis, iom pli malproksime paŝtiĝis ĉevalaro, herbo krakadis sub la dentoj de la ĉevalidoj. Ie birdo ekkriis kaj sur la kolo de la konduka ĉevalo ektintis ree kaj ree la sonorileto.

Poste io ekbrilis, kaj li rekonis lin. „Ĉu vi alvenis?" — li rigidiĝis iomete sidante. La ĉevalaro komencis malrapide foriĝi, dum la suno estis subiranta, envolvante la proksimiĝanton per ruĝa-ora lumo. Laŭ liaj piedsignoj polvo cirkulis malvigle. — Vi forveturis ŝipe kaj revenas piede — li diris mallaŭte. Tio estis antaŭlonge. Li venis jam proksimen, kaj baldaŭ ekaperis malantaŭ li la ĉevalaro, iranta laŭvice sur la rando de la horizonto. Ĝi malaperis, poste ekaperis, kelkfoje akvo ekŝprucis, brilis en la subiranta suno kiel diamanto.

„Vento estos — li pensis —, kaj nokte pluvos." Li sciis, ke la ĉevalaro revenos de la akvo, antaŭ ol la luno leviĝos. Lia ĉevalo kondukos ĝin, surdorse kun knaranta selo kaj sonorileto, pendigita sur la fuston.

Ĝis tiam li estos sola.

Kiam li alvenis, la suno jam estis subirinta, nur la ardaĵo brilis pale ĉe liaj piedoj.

Li eksidis vid-al-vide, la fusilon li kuŝigis teren apud sin. En ĝia tubo estus povinta la fingro trovi por si sufiĉan lokon.

Du homoj. Li alrigardis lin, kapsalutis, vidis liajn okulojn, ili estis nigraj kiel profundo de puto tagmeze.

— Do mi alvenis.

— Mi atendis vin.

La ardaĵo disfalis flagrante inter ili.

— Mi trairis la mondon.

De malproksime aŭdiĝis kvakado de ranoj el la kanalo, kaj kelkfoje ekkrio de birdo: Griloj ĉirpis mallaŭte ĉirkaŭ ili.

Li rostis lardon sur la ardaĵo, ankaŭ la alia manĝis, poste ili trinkis el plataj boteletoj.

— Ĉu vi ne timas ĉi tie sola? — li demandis ekkuŝante dorse sur la piede premitaj herboj.

— Ne estas kion timi.

— Eĉ armilon vi ne havas... Dum pluraj semajnoj neniu venas ĉi tien...

— Kaj tiam?

Li atendis, pensis pri nenio.

Dudek kvin jaroj. Jen ĉio. La morto alvenis, en formo de nigraokula homo. Kun fermitaj okuloj li etendis la manon por ekpreni la boteleton, li eltrinkis ĉion. Li glutis laŭte, ne aŭdis la mallaŭtan, delikatan ektinton. Poste ekaperis la ĉevalo, purrasa virĉevalo, kiu iris, kvazaŭ ĝiaj piedoj ne tuŝus la teron. Vivo, malantaŭ la morto.

Ĝemante li turnis sin surventren, sed tiam la ĉevalo jam malaperis en la nokto. La ardaĵo ekflagris ankoraŭ unufoje, kaj la luno leviĝis. Li returnis sin surdorsen.

— Pluvos.

— Tio utilos al la paŝtejo.

— La herboj plialtiĝos...

— Ĉie.

Unu homo estas nur unu. Unu vivo, unu morto.

Du homoj, super ili la pala, luma, steloplena ĉielo. Kiu diris tion? „Unu homo, sola, ne. Sola neniam. Sola homo atingas nenian rezultaton." Li havis armilon, domon, ŝipon, edzinon. Li havis perdeblaĵojn.

„Kaj mi? Nenion." — Li prenis manplenon da tero. — „Ĉi manpleno apartenas al mi, kaj nun tiu homo alvenis por forpreni mian vivon. Sed li malfruis. Oni jam forprenis ĝin. Unu pro tio, alia pro tio ĉi. El ĝi restis neniom."

Amikoj, kiuj mortis, gepatroj foriris kaj mortis, virinoj, kiujn li amis iam, kaj kiuj uzis lin kiel objekton. Por manpleno da tero, por manpleno da fromaĝo. Estis tiel.

Li ne. Li venis de alia loko kaj kredas, trairinte la mondon, ke li scias jam ĉion. Li trairis ĉion. Riverojn, montojn, inter arboj, kaj li alportis la morton. Ĉu por venĝi? „Mi ne scias. Sed estu do!" — Li ĵetis al liaj piedoj la manplenon da tero.

— La via — li diris kaj stariĝis. La morto dormis. Li staris super lin, kun dismetitaj kruroj.

— Hello — li diris. Li rigardis supren, ekkaptis la fusilon, sed lia piedo estis sur ĝi, lia trančilo en la mano. Liaj okuloj plivastiĝis kiel la ĉielo supre, kaj li ekvidis en ili la puton.

Ie strigo ekvoĉis. Li atendis tion. De nun mi mem estas la morto. „La mia — li pensis. — Ja mi estas malplena kiel dezerto." Sola.

De tiam la herboj kreskas iom pli alte tie sur la stepo. Sed efektive ŝanĝiĝis nenio. La steloj, la ĉevaloj, la norda vento. Nenio ŝanĝiĝis, nek la homo, nek la ĉevaloj. Nenio.

El la hungara: István *Takács*



Ĉu „abunde kaj redunde"?

Dum ĉi lastaj jaroj niajn literaturistajn rondojn skuis polemikaj debatoj, post apero de la romano „La Litomiŝla tombejo", en kiu nia cetere tre valora ĉeĥa verkisto Karel Piĉ uzis revolucie reformitan lingvaĵon, kun abunda enŝovo de nove (kaprice) proponitaj neologismoj. La diskutoj ĵus revarmiĝis sur la paĝoj de „Literatura Foiro", pro la publikigo de pleda letero de akademianino Eli Urbanová kaj refuta respondo de Giorgio Silfer. Ankaŭ mi intervenis en la diskuton, pere de artikolo, aperigita en n. 114 de la sama revuo. Sed mia skribaĵo presiĝis tiom arbitre reduktita (ĝis unu kvarono), ke ĝi rezultis tute supraĵa, diletanteca, senargumenta. Jen kial mi profitas la afablan gastemon de „Hungara Vivo" por esprimi iom pli funde mian penson pri la „vexata quaestio".

Sed, por premise enfokusigi la tutan aferon, eble utilos iom rekroniki ekeston kaj malvolviĝon de la enkoncerna eksperimento. Ĝi startis antaŭ deko da jaroj, pere de longa eseo, kiun Karel Piĉ sendis al konkurso „Luigi Minnaja" de UEA, kaj poste presigis en sian romanon „La Litomiŝla tombejo" (1981).

Sinteze dirite, Piĉ analizis la temon de verklingvo en esperanto, plendante, ke mankas en ĝi sufiĉe vasta vortstoko por verki romanojn same esprimriĉe kiel en kiu ajn nacia lingvo. Precipe mankas, laŭ li, nuancterminoj kaj sinonimoj. Jes, Piĉ pledis por pli abunda leksiko por proza verkado, ne por poezia lingvo, kiel siatempe faris Kalocsay. Interese estas atentigi ke, en sia eseo, la ĉeĥa bardo advokatis favore al skemisma evoluo de la internacia lingvo, sed samtempe, por plenigi la denuncitan breĉon, li proponis enkondukon de lavango da novaj radikoj kaj neologismoj, ĉiuj kreitaj (ofte laŭ tute subjektiva, arbitra elekto) laŭ naturalismaj procedoj.

Kiam aperis „La Litomiŝla tombejo" eksplodis iela skandalo. Multflanek oni reagis terurigite, kvazaŭ antaŭ nova Ido-skismo. Sed ankaŭ leviĝis admiraj, aprobaj komentoj, ekzemple flanke de Régulo Pérez kaj de la anoj de la t.m.n. (tiel mem-nomita) „Iltisa skolo" (Haupenthal, De Diego, Vatré k.a.). Laŭ mia rimarko, tamen, ĝis nun neniu el la apologiantoj de la Piĉ-a inventaĵo adoptis verke lian reformitan lingvaĵon (almenaŭ ne ekster Ĉeĥoslovakio).

Kaj fine, en 1986, aperis tiu, kiu povas esti konsiderata la breviero, la evangelio de la Piĉ-ismo, la broŝuro „Abunde kaj redunde", 32-paĝa „eseo pri diversaj stiloj en la internacia lingvo, plus sinonima glosaro de Praga artliteratura skolo". Ĝin aŭtoris la lastalveninto en la kompanion, Josef Rumler, iliadire larĝe konata ĉeĥlingva poeto kaj literaturkritikisto.

En sia longa, dense kaj malgrandlitere presita skribaĵo, Rumler analizas detale, funde, pedante, gvidprincipojn kaj rimedojn de la reformprojekto, ofte kaj tede ripetante la samajn argumentadojn, kiuj praviĝas, laŭ li, el kelkaj aprioraj, nepre nediskuteblaj teorioj kaj sentencoj. Analizante la diversajn lingvostilojn, li asertas ke „dum por stilo komuna validas la devizo „necese kaj sufiĉe" kaj en stilo faka regas la devizo „koncize kaj precize", an arta stilo funkcias la regulo „abunde kaj redunde". Nu, tio ŝajnas al mi iom stranga kaj aplomba deklaro: en la lernejo oni instruis al mi ke redundo (verdire, se ni volas esti centprocente naturalismaj, ni devus diri *abundanco* kaj *redundanco*) estas evitinda en belstila verkado, ke la proliksa, vortlavanga verkostilo de la pasintjarcentaj romanistoj ne plu validas hodiaŭ, kiam koncizo, kompakto, esenco estas konsilindaj.

Por validigi tiujn rezonadojn, la precipa tezo de Rumler estas, ke ni bezonas abundan kvanton da sinonimoj, kaj liaj postaj konvinkoklopodoj rotacias, preskaŭ ekskluzive, ĉirkaŭ tiu temo. Li diras: „La sinonimo – jen nia plej energia helpulo, nia dialektika batalanto kontraŭ la hegemoniemo de la plursignifeco"... „La sinonimeco – jen la kondiĉo de specialigo de la teksto laŭ ĝia socia funkcio" ...„Sinonimo havas ŝlosilan pozicion en la relative tre vasta sfero de lingvaj problemoj"... „Kiu ajn lingvo ne povas ekzisti, vivi, funkcii sen sinonimeco, *sen tio ne povis naskiĝi eĉ esperanto*"...„Ĉiu baza vorto havas (povas kaj devas havi) sinonimojn". Mi kredas, ke tiaj paralogikaj asertoj ne bezonas komentojn.

Kohere kun tiuj principoj, la Praga artliteratura skolo (ili emfazas ofte tiun titolon) proponas amason da novaj vortoj (aŭ morfemoj, se ni preferas tiel diri), senkonsidere ĉu temas pri mankantaj signifoj aŭ jam ekzistantaj, do sinonimaj. Kaj ĉiam laŭ naturalisma procedo, ofte el greklatina deveno (vidu, ekz. *igitur* = do, *igno* = fajro, *gaŭdo* = ĝojo, *gnozo* = sciado, *omno* = ĉio, tuto, *juvenala* = junulara, *nemo* = neniu, *opuso* = verko, *parva* = eta, *sempre* = ĉiam, *ultima* = lasta, ktp.).

Mi tamen konfesu, ke mi estas principe ne kontraŭa al enkonduko de neologismoj, eĉ de sinonimoj, kaj ke plurajn el la ĉ. 300 listigitaj en la finlibra glosaro de Rumler mi povus akcepti kaj, en certaj cirkonstancoj, uzadi, eĉ se la Piĉ-istoj konsentas, ke multajn ili rekte elprenis el la Ido-vortaro. Male, kio perpleksigas min ege, agacas mian estetikan senton (krom racio kaj logiko, miajuĝe), tio estas kiam Piĉ ne limigas sin enkonduki novajn radikojn por substantivoj, verboj kaj adjektivoj sed invadas la kampon de prepozicioj, konjunkcioj, interjekcioj, afiksoj, tabelvortoj ktp. Senbride li kreas pluroblaĵojn por ĉiu plej eta, memstara morfemo. Tiel, ekzemple, al nia simpla, humila kaj plejefika konjunkcio *kaj* li aldonas *et, ed, ak.* Apud la prepozicio *de* jen *of, ab, from.* Al *aŭ* li apudigas *sel, sive, vel.* Kaj tiel senfine: *interim* (dume), *koram* (antaŭ), *nom* (ĉar), *hik* (jen), *kom* (kiel), *nulmen* (tamen), *ma, aŭtem, lor* (sed), *ergo* (do) k.m.a.

Laŭ kiuj principoj Piĉ derivis tiujn vortojn estas al mi ne tute klare. Se precipe el la latina, kun la pretendo ke ĝi estas internacie konata lingvo, mi atentigas, ke la granda plejmulto el tiuj vortoj ne eniris eĉ en la latinidajn lingvojn, tial ilia internacieco estas hodiaŭtage preskaŭ nula. Krome, tia sinsekvo da unusilabaj, konsonantfiniĝantaj vortetoj (hik, ak, ab k.s.) igas kelkajn paragrafojn de la Piĉ-Rumler-a prozo kvazaŭ rukta rankoncerto aŭ spirrompa singultado.

Kaj, laŭ mia modesta takso, ne tro valoras aserti, ke, sen tioma abunda sinonimaro, nia prozo plenas je tedaj, malbelstilaj ripetadoj. Tia ĝeno, precipe ĉe prepozicioj,

konjunkcioj ks., ekzistas en kiu ajn lingvo, kie *nur malbonaj verkistoj ne kapablas ilin eviti*. En mia lingvo, ekzemple, la prepozicio *de* plenumas multe pli da funkcioj ol en esperanto; konjunkcion *kaj* ni posedas nur unu: simplan kaj modestan *e*, sed neniu ĉe ni iam sentis la bezonon krei sinonimojn por ĝi. Sed, verŝajne, la artliteraturaj Praganoj opinias, ke la itala estas lingvo ne kapabla krei artliteraturajn verkojn.

Pri la sama temo, mi pensas kiom multe pli granda ol en esperanto estas en mia lingvo la nombro de polisemiaj vortoj (kaj kiom ofte konfuzigaj kaj ĝenaj). Male, dank' al aglutine regula derivado, en esperanto ekzistas amaso da vortoj, por kiuj en mia lingvo ni devas uzi ĉirkaŭfrazon (ekzemple ĉe adverbigoj). En la itala ekzistas nur unu vorto por *lingvo* kaj *lango,* unu por *pulvo, polvo, pulvoro,* k.t.p. por longa vico de la t.n. „ĝemelaj vortoj".

Do, resume, ekzamenante karakteron, strukturon kaj ankaŭ leksikon de esperanto, niaj Pragaj artliteraturanoj devus, laŭ mi, ekzameni ne nur la mankojn sed ankaŭ la avantaĝojn.

Sed ni revenu al la sinonimoj de niaj abundistoj kaj vidu kelkajn de iom pli proksime. Jen *sovente,* ĉu pli bela ol *ofte*? Kaj ĉu vere necesa? *Simi,* ĉu pli internacia ol *ŝajni*? *Importenta* (kiel ne importanta?), ho, kiom pli trafa, kompakta nia *grava*! *Prato,* bela vorto, sed jam ekzistas *herbejo, razeno, gazono*! *Aŭtem* pli ol *sed*? *Tezaŭro* pli ol *trezoro*?

Sed kie la eseo de Rumler atingas plej altan gradon de kaprica subjektiveco, tie estas kiam li klopodas enkonduki karesvortojn por infanetoj, surbaze de onomatopeo (li diras). Estas sendube vere, ke tiaj vortoj mankas en nia leksiko, sed, karaj amikoj, ke *baj baj* elvokas luladon (do *baji* sinonimas luli) povas esti evidenta nur al slava orelo, al la mia tio elvokas nur hundan bojadon. Ke al *haĉ haĉ*, respondas *sidi*, kiu diris tion? Ke *tin tin* similsonas kiel *pisado*, ĉu? Imagu ke ni, en Italio, simple siblas *ŝ*.....! Same mi kredas ke nur en slavlingvaj landoj la finaĵoj *uŝk* kaj *ink* igas la vortojn karesaj („Baju, baju, bajuŝki", el Baghy-a memoro). Ja, evidente ankaŭ onomatopeo estas ofte nur tute subjektiva impreso, kiel rezultas el tiu senpripensa elekto, kvankam mi povas aprezi la bonan intencon.

Do, fine resumante el la de mi nur tien kaj tien plukita kampo (mi bezonus la tutan revuon por ekzameni komente la *vortozan* broŝuron de Rumler), mi povas diri, ke la startprincipoj de la Piĉ-Rumler-a reformprojekto sendube posedas kelkan pravigon, ke la intencoj estis verŝajne bonaj kaj aprobindaj, sed, kiel kantas Aznavour, „Vous etes allé trop loin chercher la vérité" (vi iris tro malproksimen serĉi la veron). Kiel tiu skulptisto, kiu enamiĝis al sia ĵus kreita statuo, niaj cetere talentaj Praganoj iom tro entuziasmiĝis pri sia elpenso kaj sin ĵetis plonĝe en la ebriige vastan maron de lingvokreado, sen tro atenti la saĝan rekomendon de la Majstro en la fama kaj tro ofte misinterpretata 15-a regulo, t.e. ke la enkondukotaj neologismoj (ne tro gravas ĉu mankantaj aŭ sinonimaj) estu kiel eble plej internaciaj, senpere kompreneblaj al kiel eble plej larĝa nombro da legantoj.

Tiel mi konvinkiĝis, ke niaj bonintencaj redundistoj puŝas jam malfermitan pordon, kiam ili deklaras ke „La imago ke esperanto fariĝos iam future ia totale skemisma lingva sistemo, estas vana, nereala, naiva, donkiĥota, nonsenca". (Kioma malŝparo de vortoj! Sed jes, ja, ĝuste *redunde*!). Persone mi kredas, ke neniu hodiaŭa esperantisto pensas tiele (kvankam Ivo Rotkviĉ sufiĉe lerte kaj sukcese klopodis demonstri la kontraŭon), tamen ĉiu troigo estas troigo, ĉiu eksceso nur eksceso (permesu ke ankaŭ mi iom redundu). La sperto devus instrui nin ke, ĝenerale, inter du opoziciaj ekstremoj, la ĝusto, la vero troviĝas en la mezo. Do, miaopinie, korekta kaj sukcesa evoluo de esperanto rezultos nur el harmonia ekvilibro inter la du tendencoj, skemisma kaj naturalisma. Nura ekspluato de la skemismaj formuloj kondukus al lingvo kripta, malbelsona, seka, monotona (ĉi tie Rumler pravas. Li ne pravas, kiam li asertas, ke tia lingvo estus ankaŭ nenatura, ĉar kiomaj naturecoj ekzistas kaj eblas en la mondaj lingvoj?), sed, ĉe la alia ekstremo, evoluo nur laŭ naturalismaj principoj alportus plurajn avantaĝojn de tuja, pli larĝa komprenebleco, sed ankaŭ egaligus esperanton al la naturalismaj – *kaj fiaskintaj* – planlingvoj kaj ankaŭ entute al la naciaj lingvoj, kun ties komplikaĵoj, nelogikaĵoj kaj fina ega malfacilo. Kiam esperanto atingos la lastan ŝtupon de tia evoluo, kial lerni ĝin? Jam ekzistas la angla!

Mi finas per kelkaj rimarkoj.

Rumler pledas por riĉa, varia, nuancoza literatura verklingvo, jes, sed tiu monotona ripetado de la sintagmo „porekzemple" iras, laŭ mia gusto, kontraŭflue. Ja, ni povas diri ankaŭ *ekzemple, kiel ekzemplon*, aŭ la eŭropisme nelogikan *por ekzemplo* (fakte ni diras ion, por ke ĝi rolu *kiel* ekzemplo – mi diras tion kiel ekzemplon – ne *por, favore* al ekzemplo).

Krome, mi jam delonge perdis esperon, ke slavlingvaj verkistoj kapablu uzi korekte la esperantan artikolon.

Lasta rimarko: Silfer diras: „Aserti tion en stilistiko (ke sen sinonimoj ne povas ekzisti arta stilo) estas kvazaŭ pretendi, en metriko, ke poezio ne eblas sen rimoj". Sed Piĉ ĝuste tion pretendas. En 1984 li skribis (en „Dialogo"): „Klinklangas rekviem' por parnasismo, (la rekviem' por tuta poezio!...) Sen rimoj, ritmoj vivas ja nenio!".

Konklude mi volas apelacii al toleremo, al ebla evito de kiu ajn ekstremismo (enkondukado de sinonimoj: saviga panaceo por esperanto! Se nur estus tiel simple!), al iom da humilo kaj pripensado antaŭ elformulo de drakonaj deklaroj.

Kiel dirite, mi emas akcepti kaj uzi plurajn el la neologismoj proponitaj de Piĉ kaj kompanio (*smajlo* estas nepre akceptenda por la mankanta signifo de *sensona rido*) sed mi tute kontraŭas la enkondukon de sinonimoj por prepozicioj k.s.

Ĉu mi ankaŭ aŭdacu diri, iom ruĝiĝante, ke, jen, nu, finfine, eĉ se tute senmerite, ankaŭ mi estas akademiano?

Aldo de'Giorgi

P.S. En la ekzamenita broŝuro enestas ankaŭ du longaj, originalaj poemoj de Josef Rumler: „Praga elegio" kaj „Matena melkado". Laŭ fina komento de Eli Urbanová,

pluraj kritikistoj salutis panegire la aperon de tiu nova (66-jara), eksterordinara poezia stelo. Reto Rossetti diris, pri iu lia poeziaĵo: „Potenca, obseda verko kun neordinaraj sonharmonio kaj onomatopeo". Leopoldo Knoedt konsideras la poeton: „Simile al kometo Halley, fenomeno, kiu aperas nur unufoje ĉiun centan jaron sur la firmamento".

Pri „Matena melkado" (kia poezieca temo!) mi eltiras nur unu rimarkon: el 197 versoj, 93 finiĝas per la sufikso *ad*! Laŭ mia elementa scio pri poeziaj teknikoj, tio estas nek aliteracio nek iu ajn efekta truko avangarda, ĝi estas tute simple la (de Grabowski, Kalocsay k.a.) abomenata *adasismo*. Sed, evidente, mi komprenas absolute nenion pri poezio!

Esperanto-fako pluiras en la Budapesta Universitato

Kiel oni scias, la 21-an de aŭgusto 1987 pro grava malsano mortis prof. d-ro István Szerdahelyi, universitata docento, gvidanto de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd ekde ĝia fondo en 1966. Li famigis la fakon ankaŭ en internaciaj pedagogiaj kaj fakaj rondoj per la tiea scienca laboro, per universitataj lernolibroj kaj diplomigis preskaŭ 100 gestudentojn.

Post tio la sorto de la fako estis duba, sed finfine la instrua kaj scienca laboro pluiris eĉ kun du plentempaj postenoj, kiujn plenumas du eksstudentinoj, liaj kunlaborintinoj: Ilona Koutny kaj d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits.

La fako estas unika en tio, ke ĝi donas samvaloran diplomon kiel aliaj fakoj de la universitato, kaj ofertas kompletan esperantologian studtemaron por kvar jaroj. La studoj inkluzivas krom la lingvoinstruado priskriban gramatikon, literaturon, movadhistorion, metodologion, interlingvistikon kaj temojn de la ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. Tiel ĝi estas integra parto de la katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, en kies kadro ĝi funkcias. Eblas ankaŭ doktoriĝi pri esperantologio.

Nuntempe krom la 13 tagaj studentoj ankaŭ 13 korespondaj studentoj partoprenas 3-jaran studprogramon. Tie la posedo de universitata diplomo kaj la scio de Esperanto estas antaŭkondiĉoj.

La memstara laboro de studentoj okazas en scienca sudenta rondo – temas ĉefe pri pedagogio kaj lingvistiko, kaj ekde nun sub la gvido de Ilona Koutny ankaŭ pri komputilaj aplikoj (ekz. uzo de sintezita parolo en instruado, problemoj de maŝina tradukado). Aperadas studenta revuo *Opus Nigrum*, redaktata de István Ertl (ankaŭ redaktoro de IPR).

Eksterlandaj studentoj estas bonvenaj en la fako laŭ la kondiĉoj de la Universitato: 1. Studentoj, kiuj venas laŭ interŝtataj kontraktoj kaj ricevas stipendion, povas alpreni esperantologion kiel suplementan fakon; 2. Hungaroj, loĝantaj en la najbaraj landoj rajtas studi senpage, sed devas prizorgi sin mem; 3. Ĉiuj aliaj eksterlandanoj devas pagi por la studado.

La studadon povas kompletigi la vigla esperantista vivo en Budapeŝto (kulturaj kaj sciencaj aranĝoj), eldonaĵoj kaj riĉa librokolekto.

Por pluaj informoj bv. turniĝi al Esperanto-fako, ELTE, Budapest, Pf. 107. H-1363, Hungario.

ESPAROL
paroligas vian komputilon esperante

En la Budapeŝta Teknika Universitato esploristoj ellaboris la aŭtomatan sintezon de Esperanto. La sistemo ESPAROL povas eldiri kun konvena intonacio ĉiujn Esperantajn tekstojn skribitajn laŭ la normala ortografio; ĝi prononcas ankaŭ numerojn kaj aliajn specialajn karaktrojn troviĝantajn sur la klavaro (=, +, %, ktp.).

Per simpla programo en la programlingvo BASIC oni povas voĉigi pli longajn tekstojn ankaŭ kun variabloj; paroligi la maŝinon diversrapide, flustre aŭ raŭke, eĉ eblas enprogrami kantojn.

La sistemo konsistas el aparato konektebla al mikrokomputilo Commodore '64 aŭ '128 kaj el programo sur disketo. (Tiu ĉi tuto estas nun ekvendata kontraŭ 350 DM.) Laŭ nia scio ESPAROL estas la unua parolsinteza produkto por vaste uzataj mikrokomputiloj.

La sistemon eblas konekti kun optika legilo ellaborita en la hungara komputika esplorinstituto SZKI. Tiel malbone vidantaj aŭ okupitaj homoj povas aŭskulti komputile laŭtlegatajn tekstojn.

La evoluigantoj de ESPAROL, Ilona Koutny, d-ro Gábor Olaszy kaj d-ro László Czapp laboras nun pri aplikoj kun studentoj. Pretiĝas parolanta instruprogramo por Esperanto kaj ludoj uzeblaj en instruado. Ĝi povas servi ankaŭ en la provlegado de komputile kompostitaj tekstoj.

Ĉiu uzanto mem povas fari simplajn Basic programojn por utiligi la parolkapablon laŭ siaj deziroj.

Pluaj informoj ĉe I. Koutny (Budapeŝta Teknika Universitato, Budapest, Stoczek u. 2., H-1111).



Desegno de Attila Koppány

Davidova Biblioteko Renaskiĝas

Omaĝe al la centjara jubileo de Esperanto la Saratovaj samideanoj redonis al la Esperanto-mondo la restaĵojn de la iam plej granda Esperanto-biblioteko de la mondo, kiu troviĝis en la urbo Saratov antaŭ la jaro 1925. Tiutempe pri ĝi sciis multaj esperantistoj en la tuta mondo.

En *Enciklopedio de Esperanto* troviĝas du artikoloj: unu pri la biblioteko, kaj alia pri ĝia fondinto Georgij Davidov. Tie legeblas interalie, ke post la jaro 1925 la biblioteko malaperis... Sed pri tio ni, Saratovaj esperantistoj eksciis nur antaŭ nelonge. En la jaro 1986 mi transprenis la gvidadon de la urba E-klubo „Volga Stelo", kaj mi trovis en ĝia arkivo notojn kaj artikolojn pri tiu raraĵo. La membroj de la klubo nenion aŭdis pri tiu biblioteko. Mi petis helpon en la Urba Komitato de Komsomolo ĉe s-ino Irina Spagina. Kune ni komencis la serĉon; ni ne sciis, kie la libroj troviĝas, ni nur firme kredis, ke ili devas ekzisti. En deponejo de la regiona scienca biblioteko ni finfine trovis preskaŭ 700 librojn! Kelkaj el ili havis la surskribon: „Apartenas al biblioteko de Georg Davidov, Saratov, Ruslando"; sed kelkaj el ili estis stampitaj de saratovano Gurij Fedulov; aliaj tute ne portis signon pri aparteno. Sed la eldonjaroj (1887, 1890, 1903 ktp.) permesas supozi, ke ankaŭ tiuj libroj apartenis al la Davidov-kolekto. Krom libroj ni trovis ankaŭ jarkolektojn kaj apartajn numerojn de gazetoj, revuoj el multaj landoj de la mondo – ĉiuj el ili estis de antaŭ 1917. Pliajn librojn ni trovis en la urba arkivo. Tre interesa trovaĵo atendis nin en la deponejo de la Saratova regiona muzeo – kolektoj de bildkartoj, fotoj kaj insignoj de Davidov mem! Viva historio de la komenco de la Esperanto-movado pasas antaŭ ni! Membroj de nia klubo Natalja Vasjukova kaj Miĥail Daleĉin akceptis la taskon prizorgi kaj aranĝi tiun trezoron. Ili malkovris, ke jam en la jaro 1888 funkciis en nia urbo rondetoj por la studado de la Internacia Lingvo, laboris ardaj propagandistoj, sed ilia laboro ne stis bone organizita. En la jaro 1895 (kaj ne 1903, kiel legeblas en *Enciklopedio de Esperanto*!) venis al Saratov la 26 jara komercisto Georgij Davidov. Meze de la urbo li malfermis propran vendejon de ŝtofoj kaj galanterio, kaj samtempe organizis la unuan Esperanto-Societon „Espero" en Saratov. Krom tio jam en tiu jaro li fondis Esperanto-bibliotekon, abonis por ĝi periodaĵojn el la tuta mondo, kolektis E-insignojn, E-bildkartojn, E-poŝtmarkojn.

En la jaroj 1903 kaj 1911 estis publikigitaj katalogoj de la biblioteko, kiu havis jam 3245 erojn. La germana esperantistino Elize Getta Wunderlich tiutempe skribis jene: „En Saratov ekzistas la plej granda E-biblioteko de la tuta mondo."

En la jaro 1903 la Saratova Esperanto-Societo aliĝis al la Tutrusia Esperanto-Ligo.

En la jaro 1917 la biblioteko estis alŝtatigita kaj unuigita kun alia biblioteko, kun tiu de Gurij Fedulov. Kontrolon pri ĝi prenis la Saratovaj geesperantistoj A. Ananjina, V. Staroĵickij, Sajapin kaj aliaj. En la jaro 1967 en la gazeto „Fajrero de Esperanto" veterano G. A. Zaletnov skribis la jenon: „...dum la jaroj 1919-1925 en Saratovo funkciis E-biblioteko. Ĝi havis apartan ejon en la centro de la urbo, kaj havis ŝtatan bibliotekiston. Ĝi libroklekto estis la plej riĉa en la mondo. La biblioteko estis vera universitato por multaj aktivuloj de la Esperanto-movado."

En la jaro 1925 ĝi havis preskaŭ 10.000 erojn. *Enciklopedio de Esperanto* donas ĝian procentan konsiston:

filologio	53,9 %
literaturo (beletro)	18,98 %
historio-geografio	7,16 %
aplikataj sciencoj	5,26 %
bibliografio	3,26 %
sociologio	3,26 %
belartoj	3,66 %
ekzaktaj sciencoj	1,56 %
filozofio	1,36 %
religio	1,86 %
sociaj sciencoj	1,26 %

La stranga 1925-a jaro starigis multajn demandojn, kiujn respondi ĝis nun ni ne povas. El artikoloj de diversaj periodaĵoj ni scias nur, ke „...pro la malgrandigo de la regiona buĝeto la Saratova Politprosvet (libera regiona institucio) rifuzis ĝin plu administri kaj financi. La privataj esperantistoj Sajapin, E. Ananjeva kaj kelkaj aliaj faris heroajn klopodojn por konservi la bibliotekon. Finfine en la jaro 1925 la Saratova Politprosvet komencis akceptadi kaj inventarii tiun ĉi valoran popolan proprajon, sume 9500 ekzemplerojn ĉiuspecajn."

Sed post tio la historio fariĝis entute detektiva. Neniu scias, kie troviĝas tiuj libroj. Pri la Esperanto-movado en Saratovo inter 1925 kaj 1960 preskaŭ nenion ni scias. En la arkivo de nia klubo mi trovis kelkajn malnovajn artikolojn el diversaj nialandaj periodaĵoj dum la pasintaj jaroj, kiuj certigas nur, ke estis esperantistoj en nia urbo, kaj ili provis labori memstare.

Dum la jaroj sesdekaj transloĝiĝis al Saratov la fama soveta esperantisto Afanasij Filipoviĉ Kuliĉenko. Li denove organizis E-klubon, kaj kolektis multajn dokumentojn. Probable li eksciis pri la biblioteko, kaj trovis iujn ĝiajn restaĵojn. Li restigis siajn rimarkojn kaj la proksimuman katalogon en la urba arkivo. Sed daŭre mistero kovris la trezoron. Kuliĉenko mortis antaŭ kelkaj jaroj, kaj forportis kun si multajn informojn pri la biblioteko.

Verŝajne temis pri tio, ke la Davidova kolekto iris al publikaj bibliotekoj, kies laborantoj ne konjektis pri la valoro de tiu libraro. Ili liberigis lokojn por novaj libroj, kaj ofte neniigis, forĵetis neinventariitajn, neniam de iu petitajn librojn, kiuj estis verkitaj en lingvo nekomprenebla por ili – en Espernato. Do, „saviĝis" nur ĉirkaŭ 700 libroj.

Ivan Franko
(1856-1916)

Johano la Brava

La antikvan urbon slavan
Malamik' sieĝis.
Kaj en timo la urbestro
Dian helpon preĝis.

Ĉar obstine sturmis murojn
La hordoj minacaj,
Ne plu povis sin defendi
La urbanoj lacaj.

Sed troviĝis kuraĝulo —
Metiist' Johano,
Kiu diris en sekreto
Al gepatra klano:

— Hontu, fratoj, strige sidi
Sur la urba muro!
Ni ataku la fremdulojn
En nokta obskuro!

La tendaron malamikan
Ataku akute,
Kaj — aŭ mortu ni, aŭ ili
Neniiĝu tute.

Kiel planis, tiel faris
Johano la Brava:
Polven frotis la fremdulojn
La kuraĝo slava.

La taĉmenton de Johano
Antaŭkuris gloro.
Estis tuta rea vojo —
La tapiŝo flora.

Mem Johanon metiistoj,
Soldatoj, servutoj
Glore portis en la urbon
Kun krioj, salutoj...

Kaj kunvenis la urbestroj
Por bone pripensi,
Kiel tiun gloran agon
Digne rekompenci.

Unu diras: — Por altigi
La heroan faron
tuj elektu ni Johanon
En la urbestraron!

— Ne, ne taŭgas! — diras dua. —
Jen la solvo klara:
Faru ni lin komandanto
De l' trup' gardistara.

Tria diras: — Ne, sinjoroj,
Jenon mi proponu:
Sakon da moneroj oraj
Ni al Joĉjo donu.

— Ne, ne, ne! — ekhurlis ĉiuj, —
Estas vera blago!
Kia honto! — Regi monon
Pro heroa ago...

Tiel brue urbestraro
Multajn solvojn trovas,
Sed komunan opinion
Atingi ne povas.

Sed surgrimpas la podion
La urbestro dika,
Kaj aklamas la amason
En voĉo predika:

— Gloron! Gloron al Johano,
Metiisto brava!
Sed, ĉu estas digna prezo
Por la venko sava?

— Doni monon? — Li ne prenos
Pro honto kaj pio.
Se estrigi — la aliajn
Ekregos envio.

Kaj mi diru: dum li vivas,
Li nin ege ĝenus...
Nome tial mi, sinjoroj,
Jenan solvon prenus:

Ni hodiaŭ lin mortigu,
Sur palison levu.
Morgaŭ li post enterigo
Sanktecon ricevu.

Ĉe la tombo lin priploru
Tuta urbanaro.
Kaj nomtagon lian festu
Dufoje en jaro.

— Bele! Bele! — ĉiuj kriis, —
Jen honoro rava!
...Tiun dankon do ricevis
Johano la Brava.

1882
El la ukraina tradukis:
Mikaelo Bronŝtejn



→ La kunlaborantoj de la Urba Komitato de Komsomolo, Saratova Televido, Radio, la Regiona Volga Studio de Kinokroniko, la librovendejo „Bukinist", kunlaborantoj de la Saratova Universitato kaj de la regiona scienca biblioteko aktive helpis kolekti informojn necesajn por la serĉado de la perditaj libroj. „Bukinist" anoncis aĉeti ĉiujn E-librojn, ĉar ni decidis daŭrigi la tradicion de G. Davidov — kolekti E-librojn. Por E-biblioteko oni instalis propran ĉambron en la regiona teknika biblioteko. Tie havas lokon nia E-klubo por prelegoj, ekspozicioj, lecionoj pri la historio de Esperanto.

Novembre de 1987 helpe de la urba kaj regiona komitatoj de Komsomolo ni organizis E-renkontiĝon de la regiono Volgio. La restaĵoj de la Davidova biblioteko multe impresis la partoprenantojn de tiu renkontiĝo — tiel la pasinteco povas bele inspiri por nuntempa agado.

I. A. Ĉerkasova

István Nemere

Vi povas morti nur dufoje

(Fragmento el aperonta romano, kiu estas daŭrigo de „Vivi estas danĝere")

(...) La ĉirkaŭaĵo ne estis entuziasmiga. Preskaŭ antaŭurbo kun domoj neglektitaj, mortero falanta desur la eksteraj muroj kaj en la ŝtuparejoj. Elirinte el la taksio malrapide mi promenis sur la preskaŭ senhoma strato. La dancistino de la amuzejo „Texas" loĝis en malgajaspekta, duetaĝa domo. Ŝian nomon mi legis sur malplena poŝtkesto. Sub miaj paŝoj grincis la lignaj ŝtupoj, je la sonorigo neniu malfermis la pordon. De scivolema najbarino mi eksciis, ke la knabino ne estis hejme. Denove mi estis surstrate. Neniu priatentis min. Mi bezonis pli ol duonhoron aliri la sekvan adreson. Dume preskaŭ subiris la suno. Tiu adreso estis en pli bela kvartalo de la urbo. Iom doloretis miaj vundoj – nun mi sentis vere, ke la plastika operacio postrestigis ankoraŭ kelkajn cikatrojn. Doktoro Conti en Romo ne tre ĝojis je mia decido: „Tro frue vi volas trapasi la konvaleskon, amiko!", sed ja urĝis min la volo kaj la tempo. Surfrunte, kole kaj sub la hararo ankoraŭ ne ĉiu vundo cikatriĝis plene.

Rapide mi trovis la domon. Sur la teretaĝo la domzorgantino ĝuste lavis la plankon ŝtonan. Mi malŝatas la domzorgantojn, ĝenerale ili estas bonaj observantoj.

– Bonan tagon. Ĉu fraŭlino Patricia Tavaux estas hejme?

La domzorgangino malestiman rigardon ĵetis al mi, kaj nur tiom ŝi diris:

– Dua etaĝo, maldekstre.

– Dankon, sinjorino! – kaj mi rapide supreniris. Certe en la domo oni malŝatas tiun Patrician. Jes ja, laŭ la loĝantoj, tiu ĉi domo estas tiel nomata „honesta", kaj malhonestigas la fakto ĝin, ke loĝas ĉi tie dancistino-aktorino el ia amuzejo, kiun foje-foje vizitas riĉaj viroj kaj certe pagas al ŝi... Kaj nokte ŝi ne estas hejme, tage dormas – do, ŝi faras ĉion alimaniere ol tion ŝatas la etburĝoj.

Sur la pordo estis mane skribita nomtabuleto; vere ŝia stato financa lastatempe ne estas brila, mi pensis. Tio por mi estas esperiga cirkonstanco. Mi frapis la pordon.

– Kiu..? – demandis juna virina voĉo.

– Mia nomo estas: Kvindek Mil Frankoj – mi respondis decide.

Fariĝis mira silento, poste la pordo malfermiĝis je breĉo. En la duonlumo mi vidis ŝian vizaĝon. Nazo kuspita, beletaj, sed jam ne knabinecaj trajtoj, grandaj malhelaj okuloj, blondbruna, mallonga hararo.

– Ĉu mi bone aŭdis? – ŝi demandis, dume observis min.

– Ĉu vi diris kvindek mil?

– Ĉu fraŭlino Patricia Tavaux? – mi demandis kun vizaĝo de enua milionulo. Kiel ofte.

– Mi estas.

– Mi volas kun vi paroli pri negocoj. Bonvolu enlasi min.

Nuntempe oni bone pripensas, kiun permesi eniri en la propran loĝejon, precipe se oni estas sola virino. Ja ni vivas en tempoj danĝeraj. Sed la hezito de fraŭlino Tavaux daŭris nur momenton. Miaj vestoj, konduto, parolmaniero bone efikis. Aŭ la menciita sumo efikis tiel sorĉe...? En la antaŭĉambro mi eĉ ne rigardis al ŝi, tuj mi iris en la etan ĉambron. La luita loĝejo posedis sufiĉe modestan meblaron.

– Sinjoro... Kiu vin irigis al mi? Kaj verdire, pri kia negoco temas? – ŝi demandis iom malcerte. Sen atendi ŝian inviton mi sidiĝis. Patricia ankoraŭ staris sur la sojlo. Nun mi havis okazon bone observi ŝin.

Ŝi estis beleta. Iom ŝi diferencis de la franca belecidealo, ja ŝi estis iom pli dika ol la francinoj ĝenerale. Sendube bela, sed ŝi ne plaĉis al mi, ŝi estis iom pli diketa, sed... Ŝi devis plaĉi ne al mi. Miaj informistoj sufiĉe detale rakontis pri ĉiu ĝisnuna amantino de certa sinjoro. En Afriko la fiŝo *balunga* ŝategas, tre ŝategas fruktojn, sed plejege ŝatas ĝuste tiun frukton...

La vizaĝo de fraŭlino Tavaux estis regula, ŝi havis belajn okulojn kaj eble iom tro kuraĝlinian nazon. La lipojn ŝi neniam fermis plene, iom ekbrilis la dentoj. Mi ne povis riproĉi ŝian staturon, ŝi havis ĉion belan – kiel iu mia amiko diris iam: „Ŝi posedas ĉion amendan". Ankaŭ ŝi estis certa pri siaj valoroj, ĉar fiere ŝi toleris miajn taksemajn rigardojn. Surbruste la bluzo, surfemure la pantalono estis streĉita. Kaj ŝi ne havis pli multe da jaroj ol dudek kvar. Mi esperis, ke ŝi estas inteligenta kaj kuraĝa samtempe, ke ŝi emos komenci malfacilan ludon. Se ŝi ne entreprenos, mi havos problemojn, ja restas al mi tro malmulte da tempo por trovi alian virinon. Kompreneble mi tion ne rakontos al ŝi. Mi estos plu enua milionulo; kiel ofte, ankaŭ nun mi devos fidi nure la monon.

– Neniu min irigis al vi, kontraŭe, mi mem irigis aliajn por observi vin. Tiel mi ekhavis la necesajn informojn pri vi. Mi scias jam, kiu vi estas, pri kio vi okupiĝas, mi scias, ke nun vi malhavas kontrakton kaj forlasis vin la riĉa amiko. Proksimiĝas la fino de la monato, fraŭlino Patricia. Ĉu vi havas monon por la loĝeja lupago, kaj por la aliaj fakturoj?

Verŝajne mi trafis bonege, mi vidis tion je ŝiaj okuloj. Patricia rapide sidiĝis kontraŭ mi, hezita logrideto sur la vizaĝo, kiel oni skribas tion en la plej bonaj romanoj kaj demandis:

– Kara sinjoro... mi ne komprenis vian nomon.

– Ĉar ja mi eĉ ne eldiris ĝin. Provizore mi nomiĝas „Kvindek Mil", sed nur tiam, se ni interkonsentos. Se post kvin minutoj mi devos foriri sen interkonsento, vi eĉ

groŝon ne ricevos el tiu sumo, kaj kompreneble neniam vi ekscios mian nomon.

– Vi ankoraŭ nenion diris pri tio, kion mi devus... laŭ mia modesta opinio fraŭlino Tavaux estis nur iom pli bona ol putino. Sed ŝi estis inteligenta kaj vidis tiun opinion en miaj okuloj, kaj tuj ŝi ekparolis alimaniere:

– Nu bone, ni lasu tion. Kiel dancistino kaj kabaredartistino mi ne faris karieron.

– Mi konsentas. Mi vidis vin antaŭhieraŭ en tiu aĉa programo. Kiom vi ricevas por unu vespero? Kvarcent frankojn? Ĉe mi vi perlaboros dudekoble tiom kaj poste, se vi volos, povos reveni al tiu cigaredfuma amuzejaĉo.

Ŝi preskaŭ ĉesis spiri:

– Ĉu dudekoble tiom...? Ĉu okmil por unu vespero?...

– Iel tiel, fraŭlino. Mi bezonos vin por mallonga tempo. Por semajno, aŭ maksimume dek tagoj. Se ni interkonsentos, vi ricevos fine kvindek mil.

Ŝi kuntiris la okulojn kiel kateto, ĝustigis surbruste la bluzon, pro kio la dekoltaĵo fariĝis eĉ pli granda, kaj unu femuron ĵetis sur la alian. Sendube, en ŝia kapo pelis unu la alian tre petolaj pensoj. La diableto en la profundo de mia cerbo ja tuj ekparolis: „Stultulo, kial ne..? Bona virino, kaj ja vi pagas tiom da mono, do ankaŭ tion vi povas postuli... Krome, vi pagas eĉ ne per la propra mono". Mi forpelis kaj la diableton, kaj la knabinon:

– Vi miskomprenis ion, fraŭlino. Ne mi... do, ne mi bezonas vin. Ni devos fari kune la taskon.

La rideto malaperis, ŝi fariĝis iom serioza kaj maltrankvila:

– Ĉu... ĉu mi scipovos tion?

– Certe, miaopinie. Vi posedas la necesajn... hm... ecojn. Vi bezonos krome iom da talento aktora, sed verŝajne ankaŭ tion vi posedas. Konkrete: vi devos ludi virinon riĉan el la tiel nomata bona societo, virinon, kiu enuas.

– Por tio oni bezonas multe da mono – ŝi diris rapide.

– Vi ricevos ĝin. Ne tro multe, tamen. Dum unu semajno vi ludos la rolon de mia edzino.

– Nur por la mondo, ĉu? – kaj ŝi denove ridetis petole. Mi kaŝis min malantaŭ la enua vizaĝo de milionulo:

– Kiel mi jam menciis antaŭ minuto, kara fraŭlino, ni devos plenumi certan taskon. – Mi devis ŝin informi pri gravaj aferoj, sed antaŭe mi volis scii, ĉu...

– Ĉu vi entreprenas la aferon, fraŭlino?

Nur momenton ŝi hezitis, jes ja, dume ŝi rigardis en miajn okulojn. Ŝi ne evitis mian rigardon, tio por mi estis bona signo.

– Mi entreprenas, sed mi volas scii, kiu vi estas?

– Tion vi ne devas scii. Mi certigas vin, fraŭlino, ke mi estas nek krimulo, nek ano de la mafio, mi ne komercas per armiloj, narkotaĵoj aŭ io ajn simila. Mi estas negocisto el Parizo kaj... kiel tion diri... mi volus fini la karieron de iu rivalo komerca.

Ekbrilis ŝiaj okuloj:

– Bonege! Mi delogos la ulon, poste ni preparos pornografian filmon per kaŝita kamero, kaj du kopiojn! Unu el ili ni sendos al lia ĉefo, la alian al lia edzino, ĉu?

– Io simila estos – mi trankviligis ŝin, kvankam – ĉu mi devas aparte diri tion? – temis pri multe pli grava afero ol amatora pornofilmo.

– Bonege – diris Patricia Tavaux. Ni faru la aferon. Sed se vi volas, ke mi ludu bonkvalite kaj bonnivele la edzinon de Pariza negocisto, mi bezonos ankaŭ juvelaĵojn.

– Mi scias. Sed ja mi ŝatas la puritanajn virinojn, krome vi estas tre juna kaj beleta, do ankaŭ per malmultekostaj juvelaĵoj vi atingos la bezonotan efikon.

Tio ne malemigis ŝin, ĉarme ŝi flankenklinis la kapon kaj ridis al mi. Ŝi nun estis tre simpatia:

– Ho, vi scipovas ankaŭ komplimenti, kara sinjoro Kvindek Mil Frankoj? Almenaŭ la personan nomon vi diru, kara!

– Daniel. Kaj nun atentu bone: morgaŭ matene vi prenu viajn plej bonajn vestojn. En la kabaredo komuniku al la direktoro, ke mortis via patrino, kaj petu semajnan libertempon por la enterigo. Aŭ diru kion ajn vi volas, ja poste, kun kvindek mil frankoj en la poŝo vi certe ne revenos al tiu ĉi urbo. Poste iru al la frizisto kaj kosmetikistino. Estos bezonata alia harkoloro kaj frizuro, por ke neniu vin rekonu – krome ankaŭ la tasko bezonas rufan hararon, malpli longan jupon, aplomban sinkonduton, allogan eksteraĵon. Ne forgesu, vi rolos enuantan, inteligentan junan virinon, kiun la edzo ofte restigas sola, virinon, kiu sopiras al iom da amo kaj adoras la homojn famajn... Rakontu ion al via domzorgantino, pro kio vi devos morgaŭ tagmeze forlasi la urbon.

– Kompreneble mi ne forlasos la urbon – ŝi rapide komprenis ĉion – sed...

– Sed je la dekdua horo venu per taksio al la aŭtoatendejo de la magazeno Plier. Tie mi atendos vin. Kaj jen, por ke vi ne dubu pri miaj intencoj – mi elprenis la monujon – jen kvin mil frankoj, por vestaĵoj kaj aliaj virinaĵoj. Mi ripetas: je la dekdua horo, malantaŭ Plier, ne forgesu. Oni ne povas min trompi, fraŭlino.

Mi stariĝis kaj foriris, ceremonie, kiel la princo de Kimrio. Almenaŭ mi kredas, ke tio estis la pinto de eleganteco. La masko defalis nur tiam, kiam mi forlasis la ŝtuparejon, kaj ĉirkaŭrigardis sur la strato. Neniu atendis min. La fingroj de mia dekstra mano malrapide falis desur la pistolo. Per malrapidaj paŝoj mi ekiris por serĉi taksion.

Éva Jóba: Vizio

Helpo por la rifuĝintoj

La nombro de la rifuĝintoj el Rumanio – plejparte hungaroj el Transsilvanio – en Hungario jam superas dek tri milojn, kaj ilia nombro ĉiumonate kreskas per kelkaj centoj. Akcepti ilin estas humanisma devo de Hungario, sed, kompreneble akcepto havas ankaŭ ekonomiajn konsekvencojn, kiuj ne neglektinde ŝarĝas la malfortan hungaran ekonomion. Feliĉe, iom post iom oftiĝas helpo el eksterlando – ĉefe el okcidentaj landoj kaj lastatempe ankaŭ el Pollando.

Sur nia foto: kamiono alveturigis vestaĵojn kaj manĝaĵojn al la urbo Debrecen, kiu estas unu el la centro por akcepti la rifuĝintojn.

„Anser-kunlaboro" franca-hungara



En la vilaĝo Kóka (proksime al Budapeŝto) fondiĝis komuna franca-hungara entrepreno por bredi anserojn. Temas pri specialaj francaj anseroj „Landesy", kies hepato povas kreski eĉ ĝis unu kilogramo! La bredado celas unuavice produkti multe da bonkvalita anserhepato, sed oni ne neglektas ankaŭ la modernan prilaboradon de la anserplumoj, kiuj – pro la ĉie disvastiĝanta prefero al naturaj materialoj – havas kvazaŭ renesancon ĉe la fabrikado de peplomoj, kusenoj kaj vintraj vestaĵoj.

Sinagogo plibeliĝos

La centra Budapeŝta sinagogo estas unu el la plej belaj konstruaĵoj de la hungara ĉefurbo. Tamen, la pasintaj jardekoj ne pasis senspure super la atentinda arkitektura kreaĵo. Antaŭ kelka tempo oni komencis zorgan kaj vastan rekonstruadon, kiu laŭ la prognozoj daŭros ĝis la fino de la jaro 1990. Al la kostoj de la rekonstruo grave kontribuas la hungardevena mondfama usona aktoro Tony Curtis.

La apuda foto prezentas la fasadon de la sinagogo ĉe la komenco de la rekonstruado.

Privata industriisto

Ferenc *Morvai* komencis sian karieron en la jaro 1971 kiel muntisto de akvoduktoj kaj hejtado. Intertempe li havis kelkajn inventojn, kaj delonge jam funkcias kiel posedanto de negranda fabriko (kun 40 laboristoj) de hejtkaldronegoj, kiuj vaste estas vendataj ankaŭ eksterlanden sub la markonomo „MEGAMORV".

Sur nia foto: la inventinto antaŭ siaj plej novaj kaldronegoj.

Originala Poezio

Eŭgeno Belonenko

* * *

Matene
Somero vekiĝis ruĝokula kaj laca.
La tutan nokton
Ĝi foliumis per vento la antikvan aceron,
Dezirante retrovi folion,
Tralegante kiun,
Ĝi povus travivi ree kaj ree
La forglitantan senton.
Nur matene,
Post mallonga dormo,
Somero retrovis ĝin.
Piedpremita de Aŭtuno,
Kun flavaj spuroj,
Ĝi senutile kuŝis sur polva asfalto.
La sento mankis.

Mikaelo Ternavski

Soneto

ĉu larĝiĝas vere galaksio?
kiucele vivas anakond'?
ĉu mi fakte havas komision
diri kaj ne nur en hejma rond'?

sentas mi ke havas mi mision
mi ne estas ia vagabond'
mi alvenis ja por kun pasio
ion komuniki al la mond'

flugas en la kosmo mia Ter'
iras mi surtere laŭ vok-krio
de la koro aŭ fenikopter'

jen-jen kaj ekscios mi por kio
estas viv' en formo de ilekso
aŭ tre saĝa homo aŭ murekso

Edwin de Kock

TEMPOSMOZO

Noktremparo. Kelkaj nur magraj steloj
trans la montojn rigardas
en la silenton de Ceppagna.

El la dormanta ĉambro
pensojn mi repromenigas
apud la posttagmezan kampon
kun amiko, poet' Itala,
ĉe tiuj randoj de l' kvieto
kie, krom herbo, ĉiam pli longombra
kreskas la historio.

Kaj mi scias, ke sur marmoro
blanke fragmenta,
kie la templo malaperis,
el la arbustoj blonde —
nudpieda kaj parfumita —
sinjorinas la luno
apud aliaj plandoj.

Paŝvojeto apenaŭa, ŝrumpinta
el jarmila irejo,
larĝa tra lando.
Cipo delonge froviŝita,
krom en vilaĝa nomo.

Ne venton mi aŭdas, sed la haltovokon,
tintan metalon, ledon kaj murmurojn
en Latino vulgara.
Baldaŭ okul' interna vidas
formojn ne altajn —
grizajn lunlume —
revojaĝantaj norden,
tra aliaj montoj, soldatotakte
sur la senfina marŝ' al Romo.

1986.10.10.

A. S. Császár

Eĥo de malnova fablo

La arbojn kisas lumo de l' suna bril'
per oraj strioj — vibraj fadenoj —, sed
silento templa mite pezas
koron, animon, profundan senton.

Antikvan tempon citas ĉi-fonto kun
plaŭdetaj kordoj siaj fabelas ĝi:
— Feinoj ludis iam pace
ĉirkaŭ razeno de l' vala fonto.

Insida gnomo tamen ektrovis la
sanktejon ĉastan, logis feinon for! —
La kverkoj muĝis, tero ĝemis,
povra feino pro l' honí finspiris.

Koleraj dioj pune vualis per
malhela punta ret' de l' eterna nokt'
okulojn ŝiajn; kvankam tiuj
kaŝis sin fuĝe en foraj grotoj.

Knabino mia! Fablo ĝi estis nur!
Vizaĝo via kial paliĝis do?
En val' majesta sento regas,
lulas la koron la muta arbar'.

Okuloj karaj perlas en larma ros',
tremanta voĉo ŝia afliktas min:
„Ho diru! Ankaŭ mia esto
povos simili feinan sorton?"

Semjon Vajnblat

Kiso

La senĉesa amkonfeso,
la promeso de l' kares',
dolĉa kiso sen permeso,
ĝis frenezo, ĝis forges'.

Sonoj de la violono
sonas en arbara kron',
kaj imponas la admono
en belsona amkanzon'.

Dormas mondo. En la korto
nur aŭdiĝas fola vort'
pri feliĉa homa forto
en konkordo ĝis la mort'.

revuo de revuoj

Vere memorindan kaj altvaloran kulturan „epizodon" mencias iama kunlaboranto de la *Verda Stacio*, t.e. la E-aj artprogramoj de la Ĉeĥoslovaka Radiostacio en *Brno* (STARTO 5.). Ververe hodiaŭ ŝajnas apenaŭ imageblaj tiaj E-lingvaj radioelsendoj de operetoj, eĉ operoj (Vendita fianĉino kaj aliaj), de dramoj (RUR de Ĉapek, k.s.)! Jes, antaŭ duonjarcento tiaj disaŭdigoj regule okazis je miro kaj surprizo de la publiko, kaj tute ne kiel ajn nivele: renomaj artistoj de la Nacia Teatro, eminentaj kantistoj paŝis antaŭ la mikrofonon. Kiel junulo mi mem orelostreĉe sidiĝis tiutempe antaŭ la radioaparato aŭskulti kiel eble pli da vortoj kaj melodioj el la tiam eksterordinaraj E-disaŭdigoj. Ho, kian grandan plezuron havigis al mi – kaj al aliaj multaj samideanoj – tiuj voĉoj tra la radioondoj! Tiun emocion, ĝuste tiutempe, ne facilas redoni al nuntempuloj, kiuj havas jam abunde da radioprogramoj en Eo – kvankam mi inklinas taksi malinde tro malmultaj la aŭkultantojn. Mi ankoraŭ nun alte respektas tiun pioniran agadon de la ĉeĥaj artistoj, certe neforgeseblaj por la aŭskultintoj de la plene efikaj, profesinivelaj teatraĵoj kaj operoj. Se rememori ilin, mi rekomendas al vi pli multe aŭskulti la nunajn programojn (kaj perkarte konfirmi tion) kaj pli fervore turni vin al la Esperantigitaj filmoj kaj teatraĵoj, okaze de prezentadoj.

Nesufiĉe diskutata estas en niaj medioj la pedagogia valoro de nia lingvo, malgraŭ la evidenta graveco de tiu temo por nia seriozcela propagando – kaj ene de la pliefikigo de nia movada edukado. Per la lastaj vortoj mi intencis aludi al la plifirmigo de la junaj aktivuloj, kiujn ni enkonduku en la movadajn kadrojn. LINGUA VERDE (41.) kiel itallingva periodaĵo de interlingvistoj, publikigis valoran studon de profesoro *Pennacchietti*, kiu larĝasence kaj laŭvice akcentadas la avantaĝojn de la pozitivaj valoroj de la „dua lingvo".

Se ni restas ĉe la funkcio de la lingvo, indas reflekti la dirojn (el spertoj) de la diligenta *G.G. Márquez* (LATINAMERIKA MEMUARO 3.) el Kolombio – fakte pri funkciado de la hispana lingvo en tiu kontinento. Preferindas pluralo – funkciadoj – ĉar li devas distingi inter „ekstertempa" klasika lingvouzo de patriciaj Kolombianoj (per kiu „nenion eblas mendi en magazenoj") kaj Meksikia hispanlingvaĵo (miksiĝinta kun praa indiana lingvo). Do, inter „klasa" kaj „popola" lingvoj, ankoraŭ ambaŭ „hispanaj". Sed dialektoj abundas ankaŭ krom ili, kaj kiel el la latina „patrino" disbranĉiĝis pluraj lingvoj, simile funkciis la hispana „filino"; do mi skribus prefere pri „avino kaj patrino". Tamen restis ankoraŭ interlingva solvo, kiun pro dialektaj konoj (filinoj!) la aŭtoro sukcese praktikis: li parolis antaŭ diverslandaj latinamerikanoj tiel – uzante la komunajn-radikajn elementojn – ke ĉiuj lin povis kompreni, kvazaŭ li parolus latinamerikan Esperanton – hispane. Ĉu regione disvolviĝos venonte ia „interhispana lingvo"? Vere atentinda fenomeno por niaj interlingvistoj.

Pri Zamenhof la poligloto (= multlingvulo) traktas interese *Nikola Aleksiev* (BULGARA ESPERANTISTO, 12.) emfazante la nepran karakteron de tiu homa fenomeno, kiu tute ne inkluzivas la parolan uzon de la (multaj) lingvoj, krom kelkaj, ni diru, bazaj por li. Deko, eĉ dekoj da lingvoj estas konataj de poliglotoj, sufiĉe por orientiĝi en ties strukturoj kaj specifaĵoj. Zamenhof tre modeste, do konforme al sia karaktero parolis pri siaj lingvokonoj (oni kalkulas ĝis 15), kiuj ebligis lin penetri profunde en la lingvaj esencoj – por transformi el ili la tre ekonomie konstruitan modelon, Esperanton. Necesis kompreneble talento, ne nur poligloteco. Kvankam oni povas rajte konsideri relative malvasta la intereson interne de nia tendaro pri terminologio, tamen apenaŭ iu kuraĝus subtaksi ties efektivan gravecon por niaj lingvo kaj movado. Nove-denove oni devas marteladi pri tiu temo, memkompreneble precipe en la gazetaro, ĉar nur tie povas aperi – krom kelkaj eldonaĵoj pri specialaj fakaj konferencoj – la tiom necesaj diskutoj pri la konvenaj reloj sur kiuj tiu afero povos gliti aŭ ruliĝi antaŭen. Eĉ konvinkiĝi, ke tiuj terminologiaj aferoj enhavas „terure" multajn problemojn en si mem (kiel akomodiĝi al la naciaj-internaciaj, ja diversformaj terminfaradoj, kiel rilati al la Uson-anglaj premo kaj vortlavango, kiel naturisme, aŭ skemisme – pardonu: miksisme, kaj tiel plu longe). Inter la ie-tie aperintaj, salutindaj redaktoraj inklinoj tiurilate, mi nun mencias du artikolojn – parte ne novan – en POLA ESPERANTISTO (7-8.), elektitajn per bona takto; tiujn de *Pawel Wimmer* kaj de *Paul Neergard.* Nekutime por ni, Neergard traktas kompreneme la iaman malproksimiĝon de nia lingvo en la lastatempa konsiderado kaj teorumiado de *Eugen Wüster,* la patro de la lingvonormigado. Nia Eo multe dankas al liaj grandiozaj vortara kaj teoria agado; tamen li poste akceptis kritikojn de teknikistoj, favorantaj latinecan vortoderivadon pro pluraj motivoj. Laŭ tiu direkto li certe iris tro malproksimen, al iluzioj pri aparta „terminologia lingvo". Kompreneble tiucele la rezulthavaj sukcesoj ne alvenis, malgraŭ multaj klopodoj. Tamen Wüster konsideris Esperanton daŭre grava lingvo por interkomunikado, plena de vivo kaj alte kapabla esprimi sencojn kaj sentojn – kiu apud la laŭ li nepre sobra „terminologia lingvo" estos pli vaste uzebla kaj parolata.

Ervin *Fenyvesi*

György Bálint

LA PARADIZO DE LA BIZONOJ

György (Georgo) Bálint, verkisto, publicisto, kritikisto kaj tradukisto naskiĝis en Budapeŝto en 1906. Inter la du mondmilitoj li estis elstara figuro de la literatura vivo. De 1927 ĝis 1930 li laboris ĉe la t.n. „Vespero-gazetoj" kaj liaj noveloj, kritikoj aperis de 1925 en la hungara kaj germana gazetaroj. Lia unua libro estis eldonita en 1929, kaj ĝis la fino de la mondmilito aperis ses liaj libroj. Dum la milito li estis vokita al „deviga laborservo" plurfoje; en 1942 oni arestis lin kaj en puntaĉmento lin deportis al la orienta fronto. Li mortis en 1943 en Ukrajno en militista hospitalo. La libro „La laŭdo de la bestoj", el kiu ni ĉerpis ĉi tiun rakonton, aperis en 1938.

En la kinejo dum kelkaj minutoj estis projekciitaj en la ĵurnal-filmo idiliaj bildoj. La ŝtatisto restadanta en urbo interrompis la traktadojn, kaj en la akompano de la gastigantaj politikistoj vizitis la „rezervejon por la eŭropaj bizonoj". Inter grandegaj arboj brumarŝis kelkaj bizonoj kun peza klinita kapo. Rimarkinte la ŝtatistojn ili haltis, levis la kapon, ĵetis trankvilan, reveman rigardon al ili, poste ekiris sian vojon. Senĝene ili daŭrigis la iradon en la ĉirkaŭbarita, vasta teritorio. Ili bone sciis, ke la vizito de la ŝatistoj ne tiros post si gravajn sekvojn por ili. Nenia malbono povos trafi ilin, nek ilian eŭropan, nek bizonan staton. Ili vivas en rezervejo, havas privilegiojn. Malgaje mi rigardis post la bizonoj kaj enviis ilin.

Mi pensas, ke unue en Usono realiĝis la sistemo de rezervitaj teritorioj, parte por la bizonoj, parte por la indianoj. La formortantaj specoj estas ĉi-maniere defendataj, ke almenaŭ malgranda grupo el ili restu en vivo. La indianoj neĝenate povas vivi sian praan vivon en la sankta rezervejo al ili donita; neniu suferigas ilin, neniu penas ilin konverti, adeptigi aŭ ekspluati. Oni ne incitas ilin per dekretoj, eĉ ne per eksplodaj kugloj. Ĉe same privilegiaj cirkonstancoj vivas ankaŭ la sovaĝbestoj kaj la flaŭro en la naturparko Yellowstone. En la ega parko estas malpermesitaj la ĉasado kaj elhakado de arboj. Oni lasas en paco la naturon, la bestoj kaj plantoj vivadas libere kiel ili vivis laŭ sia kutimo ekde la komenco de la tempoj. Pli malfrue estis ĉirkaŭitaj per barilo ankaŭ en Afriko kelkaj naturparkoj por la elefantoj kaj rinoceroj, en Aŭstralio por la kanguruoj. Antaŭ nelonge mi legis, ke oni planas realigi kaj por la goriloj kaj por la orangutangoj similan paradizan teritorion sur la insuloj loĝataj de la malajoj.

Ŝajnas, ke la mondo agas jene: la homo ĝis tiam daŭrigas la ekstermadon de iu bestospeco ĝis li ektimas, ke tiu definitive ekstermiĝas de sur la Tero, kaj tiam en la antaŭlasta minuto li baras por ĝi belan, trankvilan, malgrandan rezervejon, ke almenaŭ unu heroldo, unu ekzemplero postvivu. Troviĝas en ĉi tiu klopodo ia kortuŝa, mallerta rimorso. Kaj troviĝas ankaŭ io trankviliga: niatempe la homo ne permesas, ke io ekstermiĝu, eĉ ne la eŭropa bizono.

Sed kial oni zorgas pli multe pri la eŭropa bizono ol pri la eŭropa homo? La eŭropa homo – bedaŭrinde – ne havas rezervejon. Provizore li estas libera predo por ĉiaspecaj ĉasistoj; gaje kaj elane oni ekstermas lin per kanonoj, kontraktoj, ideologioj, institucioj, traktadoj, konfliktoj, interkonsentoj, oratoraĵoj. Post mallonga tempo li tute pereos, se li ne ricevos ĝustatempe „protektatan teritorion". Almenaŭ paŝgrandan, liberan teron oni lasu por li, kie la lastaj postrestintaj specimenoj povos vivi en plena libereco sian malnovan vivon, inter siaj praaj libroj, pensoj kaj revoj. La protektataj eŭropanoj sen ia sensacio, silente, retiriĝe pasigus la tempon en siaj tendoj, kiujn ili ornamus ne per skalpoj kaj surpalise fiksitaj homkapoj, sed per librobretoj kaj mikroskopoj. Vespere ili sidiĝus ĉirkaŭ la tendarfajro kaj laŭ la ridinda, primitiva rito ili neniun rostus, sed pace interŝanĝus ideojn. Se ŝtatistoj venus por mallonga vizito, la rezervejaj eŭropanoj ne timtremus, sed kun profunda bizona trankvilo ili gluus rigardon al ili plenkonscie pri tio, ke ŝtatistoj ne havas rajton malutili al ili, kaj cetere, tiuj tuj daŭrigos la vojon. Ĉio ĉi estus belega, sed la eŭropa homo ĝis nun ne ricevis sian rezervejon, kaj mi timas, ke morgaŭ tio okazos jam malfrue.

El la hungara: István *Nagy*

Ilustraĵo de Károly Jurida

György Boronkai
ĉefinĝeniero pri disvolvo

novaj rezultoj ĉe fabrikado de aerfiltriloj por veturiloj

En la nunaj tempoj rapide, eĉ surprize rapide altiĝas ĉie ajn tra la mondo la teknika nivelo en ĉiuj produktosferoj. Neniu industrio, neniu produktanto povas neglekti tiun impetan progreson de la tekniko, strebante resti en la avangardo por gardi sian lokon en la merkato. Ties manieroj ŝajne estas klaraj por la direktistoj de la industrioj, aliflanke por realigi ilin ofte necesas neĉiutagaj fortostreĉoj. Precipe kiam temas pri la merkataj postuloj, kiuj kontinue kreskas kvalite, kaj necesigas novajn kaj pli novajn, pli celtrafajn strukturojn de la produktataj varoj. Produktantaj firmaoj devas nove-denove aliformigi sian varosortimenton, serĉante laŭ merkatado la renoviĝantajn postulojn de la konsumantoj, de la aĉetantoj. Por sukcese plenumi tiun ververe naturan evoluon merkatan, eĉ relative malgranda firmao devas pli rapide disvolvi sian teknikan-teknologian nivelon, same kontinue plibonigi la strukturon kaj kapablon-kvaliton de siaj produktaĵoj. Nur tiamaniere estas gardebla kaj plifirmigebla la konkurkapablo sur la vasta merkato.

Raportante pri interesaĵoj koncerne la produktogamon de la Industria Kooperativo KLIMA, indas aludi al la tri kampoj, sur kiuj la firmao klopodas disvastigi la agadon. Jam de jardekoj estas tie ĉi fabrikataj industriaj klimatiziloj, precipe por fridado. La multjaraj tiurilataj spertoj pri fabrikado, projektado kaj muntado jam ebligis, ke tiuj produktaĵoj estas multloke uzataj de la nutraĵindustrio. Sufiĉas mencii en tiu rilato la viando-industrion, la konservejojn kaj la lakto-industrion, kiuj neniel povas malhavi la fridilojn nepre funkcisekurajn, kiujn nia firmao produktas.

Alia kampo de la kooperativa agado estas projekti, fabriki kaj munti provizejojn, staciojn de brulmaterialoj, prizorgante tiujn per propra reto tra la lando.

Depost pli ol dudek jaroj la kooperativo produktas por



Konstruado de uzino por enmetaĵoj



Instalo de faldatoro (faldanta maŝino)

veturiloj aerfiltrilojn. Komence de la sepdekaj jaroj 2-3 mil oleizitaj aerfiltriloj forlasis ĉiujare la tiucele establitan uzinon, kaj la taŭge kompilita produktaĵo kvazaŭ future vendiĝis flanke de la uzantoj de motorveturiloj ĉiutipaj. La sekvo estas facile imagebla, pro kio la kvanto de la produktado konstante kreskis, eĉ tiel, ke jam ĉirkaŭ la jaro 1980 estis produktitaj jare 10-12 mil pecoj. Memkompreneble, dum tiuj jaroj oni tre zorge disvolvis pli efika kaj ĝian strukturon, kaj la teknologion uzitan dum fabrikado.

La interna teknika disvolvado rezultigis novtipan sistemon de aerfiltrilo kun paperenmetaĵo, kaj post la jaro 1980 estis jam grandaj serioj fabrikitaj de tiu novaĵo. De tiam la fabrikado de tiuspecaj aerfiltriloj forte kreskas, eĉ ĉiujare akcele. La nuntempa sortimento de la diversaj aerfiltriloj konsista jam el tridek tipoj – kaj la uzino devas produkti de jaro al jaro pli ol dudek mil pecojn da ili.

Kvankam ne ĉiu posedanto de veturiloj – ankaŭ ne la uzantoj – konscias pri tio, oni devas nepre pripensi la ĝenerale ne videblan gravan fakton: la kvalito kaj la polvoenhavo de la aero konsumata de la eksplodmotoro grave influas la vivdaŭron kaj la rendimenton de la motoro! La uzantoj de la veturiloj kaj alicelaj eksplodmotoroj devas rimarki tion laŭ la kresko aŭ malkresko de la riparadoj, bezonataj pli aŭ malpli ofte pro

Parto de faldatoro





Funkciigo de faldatoro

Instruado pri funkciigo de faldatoro



la eroda difektiĝo de la motoro, same tiel sekve de la kostoj de la brulmaterialoj en rilato de la plenumaĵoj. Ĉies unuaranga intereso estas siavice klopodi malpliigi tiujn kostojn, por ne mencii la tempoperdon pro la nefunkcianta, riparata maŝino.

Ĝuste pro tiuj evidentaj motivoj oni devas tre atente zorgi, ke la eksplodmotoroj estu ekipataj per aerfiltrilo de taŭga kvalito. La plej grava ero de la moderna aerfiltrilo estas la paperenmetaĵo, kies filtra tasko estas allasi al la motoro nepre puran aeron – eĉ ĉe tre diversaj cirkonstancoj de la funkciigo, kiam la polvoenhavo de la media aero povas atingi 10^{-1} – 10^{-3} g/m^3.



Maŝinaro de faldatoro

Instalo de algluigilo





Filtra enmetaĵo por LADA aŭto

Industria Kooperativo „KLIMA"
Budapest, XV., Cservenka M. u. 84/b.
H-1601 P.k. 69.

Tiucele la filtrilo devas nepre malhelpi eniĝon de polveroj pli grandaj ol 5-10 um en la motoron.

La granda surfaco de la paperenmetaĵo ebligas malgrandan fluoreziston, aliflanke la paperdikeco per siaj strukturaĵoj prezentas la necesan stokeblon por la polvo. La du plej gravaj karakterizoj de la paperenmetaĵoj estas la filtra rendimento kaj la aerrezisteco. La filtra rendimento estas ĝenerale 99,9 %. La aerrezisteco, – dependa de la motora plenumo kaj enkonstruigo, kiam la nominala aerenfluo fluktuas inter 4 kaj 25 m^3/min – ĝenerale estas 800-1500 Pa.

En la antaŭaj tempoj la kooperativo ankoraŭ ne okupiĝis pri fabrikado de filtraj paperenmetaĵoj. Tamen pro la kreskintaj merkataj postuloj, ankaŭ por krei kompletan sortimenton de aerfiltriloj, la kooperativo alcelis en 1987 instali la fabrikadon de tiuj – kaj diverstipaj – filtraj paperenmetaĵoj. Grava vidpunkto estis en tiu rilato utiligi, respektive apliki enlandan aŭ najbarlandan materialojn. La realigo komenciĝis jam en la sekva jaro, kaj la kooperativo vere rajtas fieri pro la rekorde rapide plenumita teknika investado – en valoro de preskaŭ dek milionoj da forintoj.

Ne daŭris longe, kaj en decembro de la jaro 1988 la seria fabrikado de la filtra paperenmetaĵo – laŭ pluraj tipoj – jam ekiris ĉe la kooperativo, pere de modelaj kunlaboroj de niaj membrojfakuloj.

Indas koni, ke estas nepra kondiĉo, kvazaŭ premiso ĉe fabrikado de bonkvalitaj enmetaĵoj, la konvena faldado de la papero. Tiucele la kooperativo aĉetis plej modernan faldatoron en FRG. Per tiu maŝinaro eblas – krom la faldado de la papero – plenumi ankaŭ ĝian preparadon: faradon de ripoj, rando-tranĉadon, perforitan tranĉadon, kondensadon.

Post enkonduko de filtrilofabrikado por kamionoj kaj aliaj eksplodmotoraj maŝinoj, la kooperativo komencis disvolvi taŭgan teknologion de filtraj enmetaĵoj ankaŭ por person-aŭtoj. Estas grava celo, kaj certe realigebla, ekigi en la dua duonjaro de 1989 ties serian fabrikadon. Espereble la tiel plenigota merkato de tiu forte necesa veturila akcesoraĵo multe kontribuos al plimoderigo de la aerpoluciado, kiun daŭre minacas la rapide kreskanta aŭtotrafiko, se oni ne sufiĉe zorgas pri taŭgaj aerfiltriloj ĉe la eksplodmotoroj de ĉiuspecaj veturiloj.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*



Filtra enmetaĵo por kamiono

NORD-TRANSDANUBIA
BRIK- kaj
TEGOLFABRIKA
ENTREPRENO

H-9022 GYŐR
Türr I. u. 5.

FABRIKADO DE BRIKOJ KAJ TEGOLOJ

Norde de Transdanubio laboras grava entrepreno por fabriki brikojn kiel eble plej multspecajn, same tegolojn, kun la celo provizi per ili almenaŭ du dense loĝatajn departementojn, Győr-Sopron kaj Komárom; estas tiuj departementoj, situantaj preter Danubo, sur kies teritorioj la entrepreno funkciigas ne malpli ol 13 fabrikojn, kiuj produktas diversajn kvalitojn kaj specojn de la menciitaj konstrumaterialoj, per la spertoj de pli ol 1400 laboruloj. Daŭris longe, ĝis la entrepreno plenumis jam la modernigon de ses plej grandaj fabrikoj. Sed restis ankoraŭ en la ceteraj la kutima, tradicia labormaniero, utiligante aparte la sezonojn, en kiuj la produktadon eblas avantaĝe kaj bonrezulte plenumi, helpe de la tiubranĉe bezonata korpa, laciga laboro.

El inter la modernigitaj, per maŝinoj konvene ekipitaj fabrikoj tri funkcias en la departemento Győr-Sopron, kaj indas mencii, ke tiu en urbo Sopron estas nuntempe la plej moderna fabriko de la branĉo.

Per sia vasta produktado, la entrepreno fabrikas entute tridekon da specoj de brikoj kaj plafonaĵoj, krome kvar specojn de tegoloj. Nuntempe la teknika evoluo direktiĝas de la malgrandaj brikoj al la pli preferata, pli bone uzeblaj blokaj brikegoj. Dum la lastaj jaroj la fabrikado devis jam aliri al la termoprotektaj brikospecoj laŭ ceramikaj strukturaĵoj. Tiuj estas produktataj kaj por muroj, kaj por tegmentoj, plafonaĵoj.

Inter tiuj troveblas la populariĝinta kaj tre postulata brikegosortimento RÁBA, ankaŭ la brikego HB



Plafonbrikego FB 60/19 el Sopron



La moderna brikfabriko en Sopron

38, kaj la skeletaj plafonbrikegoj FB 50/19 kaj 60/19. Ĉi tiuj blokecaj brikegoj ni devas ĉiujare pli kaj pli multon fabriki. Por kontentigi la kreskantan postulon la entrepreno pasintjare produktis pli ol 45 milionojn da brikegoj RÁBA en Csorna kaj Sopron, kaj 182 milionojn da bakitaj brikoj – se kalkuli laŭ la kutimaj malgrandaj kompaktaj brikoj – krome 22 milionojn da tegoloj. Indas mencii tiurilate, ke ties pli ol okdek procentoj estis aĉetitaj de la loĝantaro por siaj konstruadoj.

Dumtempe la forte amlpeksiĝintaj konstrulaboroj kreskigis la bezonojn tiom alten pri la novkvalitaj brikoj kaj la tradiciaj tegoloj, ke la entreprena produkta kapacito jam ne povis sekvi la merkatan postulon. Jen ĉe la investantoj, jen ĉe la privataj konstruigantoj ne eblis kontentigi la mendojn, malagrable mankis iuj specoj de la sortimentoj, forŝoviĝis liveraj limtempoj kaj ties vicordoj.

Malgraŭ forta kreskigo de la produktado, la perturboj apenaŭ malpliiĝis, ĉar la merkata postulo tre grave aliiĝis, postulante la pli kaj pli modernajn kaj taŭgajn produktaĵojn. Tiun grandiozan ŝanĝiĝon motivis plejparte la novaj termoteknikaj normoj, kiuj precipe grave efikis ĉe la loĝantaraj aĉetoj, pro la forte kreskanta privata domkonstruado.

La entrepreno aparte strebis disvolvi la fabrikadon por forigi la menciitajn merkatajn mankojn, rapide pliigante sian produktokapaciton. Estis rekonstruitaj du fabrikoj, tiuj en Tata kaj Pannonhalma; la komplete renovigita brikfabriko en Kisbér, baldaŭ poste ankaŭ la nova fabriko en Csorna jam komencis la produktadon. Tie ĉi estas fabrikata la So-tegola tegaĵo, respektive la eroj de tiu populara tegosistemo. La fabriko en Kisbér produktas la THERMOPOR-brikegojn, kiuj bone kontentigas la novajn termikajn postulojn. De tie atingas la mendantojn cetere la brikego HB 38, kapabla je termotransiga faktoro de 0,7 W/m^2. Da tiuj brikegoj HB 38 pasintjare estis fabrikataj ĉ. 15 milionoj.

Sed la perspektivaj planoj de la entrepreno strebas al pli ampleksa disvolvado. Modele servas la tre moderna fabriko en Sopron, ĉar nur similaj – aŭ eĉ pli modernaj – novaj brikfabrikoj povos konvene kontentigi la daŭre kreskontan merkatan postulon je tiaj konstrumaterialoj. Tiun fabrikon en Sopron karakterizas ne nur grandioza kapacito, sed ankaŭ la eminenta kvalito de la produktaĵoj, kaj la elasta varieblo de la fabrikendaj sortimentoj. La fabriko *produktas kontinue kaj sen fuŝaĵoj;* ĉiuj pecoj tie fabrikitaj estas unuaklasaj. Kaj ni aldonu: ĝia produktivo estas la trioblo de la averaĝo de la branĉo!

Laŭ la esperataj financebloj oni planas en urbo Győr establi la novan brikfabrikon, ekipotan per plej modernaj instalaĵoj, kaj en Beled la ampleksan novan fabrikon de tegoloj kaj tegaĵoj. Oni kalkulas proksimume tri jarojn por establo de tiaspecaj fabrikoj, kaj tiam la merkato de la konstrumaterialoj en tiu Hungarlanda regiono atendeble akiros la necesan ekvilibron. Ĝis tiam la entrepreno klopodos pliampleksigi la produktadon, laŭ ĉiuj ebloj disvolvante la jam ekzistantajn teknikajn kaj organizajn rimedojn, do por favore altigi la produktivon kaj la rendimenton, servi tiel la klientaron.

(E. F.)



Ankaŭ la longtruaj interĉambraj brikoj FB 50/19 kaj /10 cm devenas el Sopron

Enpakado de krad-brikoj 4/4 en Beled.

Ĉu laŭkutime konstrui domojn aŭ per malpezaj strukturaĵoj?

Preskaŭ kvardekjara praktiko kaj abunde da spertoj amasiĝas ĉe tiu ĉi konstruista entrepreno, kiu havas la devon fari la rekonstruadojn de loĝdomoj kaj publikaj konstruaĵoj en la tuta departemento. Rapidaj ŝanĝiĝoj de la metodoj, de la pli kaj pli modernaj teknologioj, eĉ multaj teknikaj novigoj karakterizis la evoluon de la entrepreno dum la pasintaj jardekoj, depost la jaro 1951. Apartan emfazon ricevis la menciitaj rekonstruaj taskoj pro la ofte bezonataj „artaj" farendoj, kiuj konsistigis restarigon de la originalaj formoj kaj statoj, zorge gardantaj la estetikan-arkitekturan valoron de la konstruaĵo. Jen historie, jen arthistorie alte taksatajn domojn, foje loke prestiĝajn konstruaĵojn devas la spertaj metiistoj de la entrepreno renovigi, fakte restarigi laŭ iamaj bildoj aŭ planoj por kontentigi la respekton de la loka publiko.

Gravaj farendoj devenas pro nove instalitaj sidejoj de departementaj publikaj institucioj. Tiucele la entrepreno jam kolektis taŭgajn strukturajn modelojn laŭ la diversaj celoj de tiuj institucioj. Aparte elstaras el la lastatempaj laboroj la inaŭguro de la Kulturdomo en Pitvaros – ties domon karakterizas tipaj arkitekturaj trajtoj de la suda Ebenaĵo: laŭkutima brikmuro, kun monolita kaj prefabrikita miksita tegaĵo. La entrepreno – CSOMIÉP – dum pli ol jardeko okupiĝas pri projektado, fabrikado kaj muntado de la malpeza skeleta strukturo de tipo „C". La ŝtalskeleto de tiu tipo estas propra inventaĵo kaj patento de la entrepreno. La malpeza skeleto montriĝis vaste uzebla, eminenta konstrumetodo, sekve de sia sprita teknika ideo. Temas fakte pri unusola ŝtalprofilo, malvarme fleksita „C" ŝtalprofilo, kies varieblo, struktura moveblo kaj ŝanĝeblo prezentas ege multspecajn uzeblojn. Pere de variado de la ŝtaldimensioj kaj lamendikoj tiu sistemo kapablas sekvi la plej diversajn funkciajn, estetikajn kaj ŝarĝigajn postulojn. Oni povas transponti kian ajn spacon aŭ halon ĝis tridek metra distanco por kovri ĝin per tiu metodo, ankaŭ kunigi avantaĝe per aliaj konstrusistemoj. Ĝi estas tiel elaste manipulebla, ke nenio malhelpas adapti ajnan spacodividan komponenton akireblan en la merkato.

Tiu malpeza skeleta sistemo, kvazaŭ „domeno" de la konstruado, ebligas grandiozan liberecon al la projektisto kaj konstruisto. Tutlande troveblas tiamaniere konstruitaj magazinoj kaj uzinhaloj – ekzemple en Budapeŝto halo de aŭtoriparejo, en pluraj urboj metilernejoj kaj laborejoj, por lasi senmencie la multajn aliajn. Mem la profiloj, la interligaj nodoj, ankaŭ la tuta strukturo prezentas ian specialan, leĝeran, elegantan kaj estetikan aspekton – reklamante sin mem, la skeletan sistemon.

Lastatempe tiu sistemo disvastiĝas ĉe konstruado de fridejoj. La „C" skeleto – kompletigata per konvena termizola tegaĵo – servas aparte taŭge kiel strukturo por tiaspecaj establaĵoj. Utiligante la aluminilamenan sandviĉpanelon – kun termizola poliuretan-ŝaŭmo – de marko ALUPAN, oni akiris bonefike temperaturon de -20 C gradoj en la tiel konstruitaj fridmagazenoj (Mátraterenye, Bácsszöllős, Törökszentmiklós, Szeged).

Helpe de enkonstruitaj granddistancaj, kadrecaj konzoloj oni povas rapide superkovri ampleksajn spacojn. Kompreneble tiu strukturo tre bone taŭgas ankaŭ por lernejaj gimnastikejoj kaj naĝejoj, facilmaniere tegante ilin.

Laborante multe por meliorado de agroj, la entrepreno – kune kun TETA Inĝeniera Kooperativo – diversmaniere ekigis disvolvadon de ofte troviĝantaj terenaj objektoj, por ties tipigoj kaj prefabrikado.

La prefabrikitaj ferbetonaj konstrueroj, hidroteknikaj kaj aliaj, estas jam vaste uzataj. Inter ili troviĝas gravitaj tuboj ferbetonaj, ankaŭ 60-100 cm diametraj kaj ties engorĝiloj, prefabrikitaj ferm-ŝaktoj, ŝtalaj akvobariloj, elementoj por tegi fundon de fluujoj kaj fosaĵoj, flankon de fluujoj kaj talusoj (malpezigitaj kaj kadrecaj), puriga kaj elfluiga ŝaktosistemoj, deklivon bremsaj, sedimentretenaj objektoj, ankaŭ subtenaj muroj kaj terenŝtupoj el TETA-FAL-elementoj, krome specialaj betonelementoj por erozioprotektado.

(E. F.)

Konstruindustria Entrepreno de Departemento Csongrád
Hódmezővásárhely
Tanácsköztársaság tér 59.
H-6800

HALOJN

FRIDHALOJN

DEPONEJOJN

GIMNASTIKEJOJN

PER MALPEZAJ KONSTRUMATERIALOJ!

— Rapide
— En bona kvalito
— Je favoraj prezoj

de

CSOMIÉP

en uzpreta stato...

Por viaj planoj de teknika evoluigo ni ofertas niaj servojn kaj referencajn konstruaĵojn.

PER NI ĈIO MARŜAS PLI FACILE...

HÓDMEZŐVÁSÁRHELY
Tanácsköztársaság tér 59.
6801
Telefono: 62/41-433
Telekso: 84-235

RECENZOJ

Inspirito de la racia muzo

Sándor Szathmári, Perfekta civitano: plena novelaro. Budapest: HEA, 1988, 456 p. 21 cm. Prezo: 39,- ned.gld. (Por Hungario: 200,- forintoj.)

Ni eble komencu ĉe la evidentaĵo, ke normalan recenzon de tia verko oni ne povas verki. Al neniu Esperanta leganto necesus prezenti la aŭtoron. Al neniu, kiu entute aĉetas, necesus rekomendi la aĉeton de ĉi tiu volumo. Oni jam scias pri li, kaj oni certe jam decidis aĉeti. La kutimaj taskoj de recenzanto malaperas, kaj oni alfrontas la defion efektive kritike aprezi la kontribuaĵon de Szathmári al nia kulturo. Tiu defio, cetere, havas centran lokon en la problemaro de la Esperanta kritikarto, pro kialo identigita de Vilmos Benczik en grava Postparolo al ĉi tiu novelaro: „la pensaro de liaj verkoj admirinde harmonias kun la celado de la lingvo en kiu li verkis, ili elspiras varman deziron por mondo pli racia, kiu garantios por la homaro longan vivon sur tiu ĉi terglobo" (p 450). Liaj verkoj apartenas al la centra fluo de la Esperanta kultura strebado. Nia kritikarto, por trovi siajn premisojn kaj hardi siajn ilojn, nepre devas elprovi premisojn kaj ilojn ĉe la kritikado de liaj verkoj.

La provo komenti pri liaj verkoj devas ekiri ĉe la konstato, ke li verkis en memkonscie komenta rilato al specifaj figuroj de la racia kleriĝo. Oni certe tuj pensas pri Swift kaj Wells, al kiuj komentan kaj kritikan rilaton konstruas liaj ĉefverkoj Vojaĝo al Kazohinio kaj Maŝinmondo. Kiel recenzanto evidente ne povas ordinare recenzi lin kaj tial devas kritiki, same tiel li, verkante en tiu racia fantazio kiu regis lin, „evidente" ne povis simple verki, sed sentis la tujan bezonon aktive relegi kaj do reverki kaj pluverki iujn klasikaĵojn en la historio de la racio. Rigora sciencisto ne rajtas senbride kaj fantazie prezenti ion nure originalan, sed devas unue submetiĝi al la disciplino de la studado, devas unue trempi sin en la modernan tradicion, en la ekzistantan kritikadon de la naivaj fantaziaĵoj de la komuna mitaro, por poste disvolvi sian personan kontribuon al la racia kritika tradicio. Iom tiel procedis Szathmári. Originalan penson li kompreneble havis: li konsekvence kaj ne flankiĝante trapensis la kategorion maŝino, kaj tio donis al li tute individuan vizion. Sed li ne verkis viziule. Li laboris por eniri la rondon, kies kohero kaj kontinueco venis el la sciencaj studoj ekde Galileo kaj kiu ekkonsciis pri sia fantazia flanko ĉe Swift, Jules Verne, kaj H. G. Wells; al la ekzistanta pensa kaj konscia konstruaĵo de tiu grupo li aldonis siajn tegmentojn.

Intence mi parolas pri tegmentoj kaj ne pri muroj aŭ pordoj aŭ fenestroj. La fantascienca ĝenro de Jules Verne aŭ H. G. Wells prezentis la perspektivon de senfine plialtiĝonta turo, kiun oni povus ade kaj ade plukonstrui. Szathmári, kontraste al tiuj aŭtoroj, rimarkis inherentan limon en la kapablo de la homoj konstrui, kaj sentis ankaŭ, ke tiu limo faras nin homaj, iel ŝirmante nin kontraŭ la alie senfunda trueco de iu kosma vako. Tegmento ne nur interpunkcie finas la domkonstruadon, sed ankaŭ faras el la domo hejmon, kaj revenigas la konkretan laboradon de la masonisto al la abstrakta pensaĵo kreita de la arkitekto — revenigas la maŝinan estadon al la racia kaj do spirita estaĵo. La vojaĝo de Szathmári estas reveno de la aventuro, la scienca revolucio de la kleriĝo, al la evoluo, la arta integreco de la renesanco. Niaj generacioj, kiuj nun fine aktualigis la postprogresan, postkleriĝan bildon de mondo difinata de limoj kaj paradoksoj, komencas en niaj vivoj iom similan vojaĝon, kaj povas multon lerni de la kritika stilo, kiun ekzemplas la verkado de Szathmári — komentario, kiu sin ligis al la estetika tradicio de la klerismo, kaj do prezentis sin ne en la esea formo, sed fikcie. Kion oni ne povas diri, tion oni devas indiki, kiel siatempe komprenis Wittgenstein. Tial Szathmári devis esti fikciisto kaj ne filozofo. Tio ebligis al li preni la bezonatan distancon de la mondo. Ni, kiuj volas lerni de li, devos niavice distancigi nin de li unue por povi poste pli bone kompreni lin.

Tiun distancigan taskon Szathmári mem jam faciligis al ni. Li eble ne intence faris tion — certe ne nur pro la ĝentileco li publike dankis al Kalocsay „ne nur lian helpon, sed precipe la brilan tradukon de la rakonto Vincenzo, per kiu li montris al mi la vojon, kiel mi devus verki, se mi estus ne nur verkisto, sed ankaŭ majstro de nia lingvo", kaj ni ja supozu, ke Szathmári deziris havi la estetike plačan eksteraĵon de vaste ŝatataj klasikaĵoj, deziris bele verki, sed ke lia tute aparta muzo eĉ kontraŭ lia volo devigis lin verki iom sen la kutimaj sukoj kaj fluoj, iom seke kaj fremde. Pro tio, ni ofte ne entiriĝas en la rakontulojn, sed restas brelt-fremde ekster la teksto, kaj sekvas la racian kreaĵon de la komentema aŭtoro. Eble iom tiel ni devus legi ankaŭ la intelekte fasonitajn tekstojn de William Auld, alia inspirito de la racia muzo, kiu tamen ofte enteksas nin en la teksto de sia arta ludado, kaj ĉe kiu do ni devas pli peni por konservi nian kritikan aliecon. Ĉe Szathmári, la evito de la sonora aŭ lirika dolĉo estas tiel intima parto de lia stilo, ke iom nekutiman kaj deeksteran legmanieron trudas al ni la tekstoj mem.

Tio signifas, ke kritika alpaŝo al liaj tekstoj povas sen artifika virtuozaĵo facile hipotezi, je la nivelo de io evidente perceptebla, ke Szathmári alparolas nin, kiel samtekstanojn, en la kadro de nia legado de la tekstaro, kiun ni nomas la scienca tradicio, kaj ke li nin invitas relegi la tekstojn kun li, aktive kaj do reverke. Liaj fikciaĵoj detale kaj diverse prezentas tiun inviton, repensi la ideon racio kaj ĝian realigon en la formo maŝino, kaj fari tiun repensadon kadre de relego de la scienca tradicio.

Sekve, nia kritikarto povas, sen aparta

fortostrečo, ligi unu el siaj centraj taskoj — la aprezadon de Szathmári — kun fundamenta percepto de la strukturisma kaj poststrukturisma kritikarto. Temas pri la percepto, ke en la hodiaŭo ni povas efektive kaj samtempane legi nur tion, kion nia hodiaŭa stilaro permesas al ni iasence reverki. La serioza legado estas la relegado, kaj la relegado prenas la formon de almenaŭ skema aŭ skiza („interna", se ne skriba aŭ buŝa) reverko aŭ re-prezento de la legaĵo. Ni vere analizas nur tion, kion ni povas almenaŭ forme sintezi. Kaj la moderna homo ne konsentas kompreni, aŭ „vere" kompreni, krom per la analizo. El ĉi tiu plektiĝo sekvas, ke en la hodiaŭa verkado oni ne plu povas nete apartigi la unuavican aŭ krean verkadon disde la duavica aŭ kritika diskutado. La fremdiga stilo de Szathmári ne estas handikapo. Ĝi markas lian specifecon kaj lian partoprenon en la moderna relega entrepreno.

Denove sen tordoj aŭ klopodoj, ni povas noti, kiel precize nia aŭtoro lokas sin en historia viciĝo identigita de strukturisma kritikanto — en la sinsekvo de la antikvaj eposoj pri la gentaj dioj, la mezepokaj lirikaĵoj pri la personaj koroj, kaj la modernaj prozaĵoj pri la socia realo. Szathmári iom draste metas sin sur la flankon de tiel konceptata moderno, kaj distancigas sin de la klasikaj dioj kaj koroj. Li strebas prezenti tiun kernan racion, kies enesto en la moderna spirito ebligas al la nunaj socioj lanĉi la entreprenon bazi novan socion sur senmanka kritiko de la gentaj dioj kaj de la personaj koroj. Pro tiu strebado, li fariĝas emfaza partiano de la raciisma (diference de la empiriisma) interpreto de la moderna klopodo.

Ĉe li, kiel ĉe aliaj raciistoj, la homoj kreas — kaj, se ili ne volas daŭrigi la stultaĵojn de la ĵusa generacio, nove rekreas kaj relanĉas — la modernan vivon, surbaze de kritikado kaj pensado pri la naturo de la homoj kaj de la medio. Kontraste, ĉe la empiriistoj, la homoj estas ĉefe viktimoj aŭ dorlotitoj de diversaj lokaj-tempaj sortoj kaj grandparte miskomprenas, kiujn rolojn ili ludas, kaj kial. La raciistoj ja agnoskas la gravecon de la sorto kaj hazardo kaj la partecon de la homa kompreno, sed en la fina analizo reliefigas la kapablon de la homoj krei sian stilon akcepti kaj modifi la realon — kaj do, finfine, krei la realon surbaze de ideoj. Por la raciistoj, do, tiu klareco de la ideoj, per kiuj la homoj science ekkomprenas la naturon, karakterizas ankaŭ la komprenojn kaj planojn, per kiuj ili kreas sian historion, kompreneble ene de la limoj de la ekzistantaj kondiĉoj kaj kapabloj. Kaj ĉe la empiriistoj, la historio aspektas kiel ia hazardludado sen veraj ludantoj kaj sen ebleco atingi komprenon de la eventoj, por ne paroli pri la povo ŝanĝi ilian fluon — tute malsame ol la eksterhoma naturo, ĉe kiu ankaŭ la empiriistoj konsentas, ke ni povas atingi ĉiam pli fidindan kaj klaran komprenon. Sekve, ĉe la empiriistoj en la fikciarto, kiuj nomiĝas naturalistoj, la homa mondo paradokse prenas la formon de nekomprenebla kaj tial tre detale priskribenda „naturo", de pejzaĝo en kiu la roluloj estas kaptitaj; dum ĉe la raciismaj verkistoj, fake nomataj „realistoj", la homoj kreas homan realon surbaze de sia pritraktado kun la eksterhoma kaj alihoma naturo, kaj tiamaniere ĉesas esti viktimoj aŭ dorlotitoj. Estas klare, ke la esencaj principoj de la realismo funkcias en avangarda formo ĉe Szathmári.

Se ni sukcesos pensi, kun li, la kategorion Maŝino, ni vidos, kiel lia avangarda realismo per sia enhavo preteriras la demandon de realismo kaj naturalismo en la konata formo, en kiu ni ĵus prezentis ĝin. Kaj nia aliro al lia laboro povigos nin pli bone kompreni, kion li diras, kaj ne nur adekvate klasifi lian verkomanieron en tabelo de epokoj kaj tipoj.

Szathmári rakontas en aŭtobiografieto, ke li studis en la maŝininĝeniera fakultato de politekniko en Budapeŝto ekde 1915 kaj, post la diplomiĝo, li „fariĝis inĝeniero de la fabriko MÁVAG, kiu havis diversajn pezindustriajn uzinojn kun 30 000 laboristoj, kaj tie mi okupiĝis per maŝinplanado" (p 426). Li do rekte partoprenis tiun maŝinan laboron, kiu determinas la formon de la moderna homa medio, kaj lia specifa okupiĝo estis la „maŝinplanado", kiu donis al li okazon por abstrakte pensi pri la maŝinoj. Li perceptis, ke la kategorio Maŝino permesas kaj jam okazigas tiel drastan kvantan kreskon de la planado pri la sistema homa laboro por plenumi la dezirojn kaj bezonojn de homoj, ke la ideoj, kiuj principe ĉefas ĉe la sistemaj planoj, transprenas la podion kaj alportas kvalitan ŝanĝiĝon. Antaŭe, la laboro — nome, la farado de agoj utilaj por ies bezonoj kaj deziroj — difiniĝis per tiuj impulsoj kaj per la eblecoj de farado kaj de „farigado" aŭ klasa ekspluatado, al kio diversmaniere servis kaj influis la apero de maŝinoj. Sed en la nuna jarcento, kvalite nova ŝtupo, niaj impulsoj mem ne plu apartenas al ni aŭ difinas nin, ĉar ĉiam pli la mekanikaj ebloj kaj devigoj difinigas normajn aŭ akcepteblajn dezirojn kaj evidente ŝanĝas la dimensiojn de la ideo de kapabloj fari kaj farigi. Tiu paradokso, ke la materia progreso fonigis la impulsojn kaj donas la podion al abstraktaj ideoj, aperas al Szathmári en tute specifa formo: komentante pri sia novelo Maŝinmondo, li notas, ke „la senlime perfektiĝanta materio renkontas sian antipodon: la pure senmaterian mondon de la ultrasubstancoj" (p. 430).

Konantoj de la platona-hegela traktado de la objektivaj ideoj, aŭ de la moderna proprigo de tiu traktado ĉe Karl Popper kiu nomas ilin la Tria Mondo (ekster la Unua Mondo de la materio kaj la Dua Mondo de la sentoj, bezonoj, impulsoj, decidoj), rekonos ĉi tie la temon de la forma aŭ objektiva evoluo, kiu prezentas sin al la subjektiva percepto kiel io ekstera kaj magia, kaj kies logiko sisteme malkongruas kun la patoso de la persona sentado. Szathmári estas inter la unuaj, kiuj rimarkas, ke ĉi tiu kontraŭdiro — inter la forma abstrakteco de la materio/spirito kaj la enhava konkreteco de la bezonoj/deziroj/sentoj/agoj — fundamente problemigas la vivon mem, kvankam ĝi aperas nur ĉe la akute evoluinta specio, kiun ni nomas la Homo. Alidire, li rimarkis, ke la vivado, per sia strebo forigi la suferojn, aspiras al ia stabileco kaj regula pliperfektigado de formoj, kaj ke per tiu kreado de la „propra" realo la vivo tiel efike batalas kontraŭ la „ekstera" naturo, ke okazas kurioza inversiĝo, kaj la memkreita perfekteco ekaspektas fremda kaj igas nin serĉi en la ekstermaŝina naturo ian lastan azilon de la vera vivo, tiel perdante la sencon de la strebado al senperfida medio. Ĉe Szathmári, avangarda realisto, la klopodo de la homo krei sian realon prezentas kulminon de la strebado de la vivo plibonigi siajn kondiĉojn, kaj detruas la sencon de la ideoj vivo, bonigi, kaj kondiĉoj. Tio estas unu apokalipsa maniero prezenti la tensiojn de la realismo.

Tiu ĝisfina kaj sinnuliga gesto ŝajnas difini la tekston de la ĉefverkoj de Szathmári, kaj tiel li priskribas sian pesimismon en la propra eksplicita komentario. Sed evidente ion nedireblan sed gravan indikas al ni la trankvila kaj akcepta prezento de ĉi tiu pesimisma aŭguro, ke ni devas aŭ raciige senarbitrigi niajn impulsojn, aŭ definitive perei en kosmo, kiu trankvile evoluados sen vivantaj estaĵoj. Mi volus hipotezi, ke la novelo Urania (314-321) malŝlosas la pozitivan subtekston, kiu suplementas kaj modifas lian pesimismon. Ĝi estas forme malpeza „grize didaktika" peco, kiel prave diras (447) Benczik en la Postparolo, kaj ĝi eĉ tro evidente alprenas la fabelecan rakontmanieron, kiun raciismaj aŭtoroj ŝajne bezonas por emfazi, ke la vivanta spirito senkondiĉe kapablas krei sian sorton, kvankam la (eksterfabelaj) efektivaj kondiĉoj en konkretaj kazoj iom limigas tiun kapablon. Sed, enhave, Urania diras, ke „la mondo estas senfina, sed ne senlima", ke „la spaco estas malrekta kaj rekurbiĝas al si mem", kaj ke la bombasta demando „kien alvenos la homa socio, kien kondukas la vojo de la progreso kaj kie ĝi finiĝos" per kompleksa logiko malkompleksigas sin ĝis la facilanima, sed vera respondo: „en mia ĉambro". Tiu apudteksto permesas al ni legi en Maŝinmondo subtekston, kiu ja finiĝas en la ĉambro de la aŭtoro, kiam li konstatas kun kontento, ke „la konversacion mem mi priskribis", kvankam ne plu disponeblas la vera H. G. Wells por atesti, ke efektive tiel aspektontis la estonteco. La sugesto do estas, ke oni revenas al si, kaj fine sukcesas esti hejme.

Tiu sereneco ne estas formulo por memkontento ĉe Szathmári. Li komprenas, ke ni komence ne sentas nin hejme, senkonsidere kie kaj kiel ni estas; kaj ke do ni lanĉas grandegan strebon, eĉ re kaj relanĉas aventurojn se niaj emoj sufiĉe forte rifuzas kongrui kun la ĉirkaŭaĵo kiu ŝajnas hazarde kaj arbitre sufoki nian liberon. Kaj kun ni li fine atingas la trankvilon, kiam li vidas, ke per la strebado ni perstrebas la rajton ne ĉiam anhele strebadi, la rajton rilati akcepteme al la realeco de la realo — kondiĉe ke ni daŭre komprenu nian rajton kaj devon kree kontribuadi al la evoluigo de tiu realo, ĉar ni komencas velki ĉiufoje, kiam ni ĉesas kontribui.

Mi konjektus, ke la trankvilo de Szathmári fontas el lia kompreno, ke la vivantoj agas proprainiciate kaj kree, kaj ne nur pasive kaj emocie reagas al nature aŭ logike limigita sorto. Per la iniciatado, la vivantoj same intense partoprenas en la realaĵo, kiel

la senkompataj naturo kaj logiko, kiuj limigas ĉiujn iniciatojn; dank' al tiu verva intenseco, la vivantoj foje sukcesas simple ĝoji, kaj sendependigi sin de la objektiva „senkompateco" de la naturo aŭ logiko, de la Unua Mondo aŭ la Tria Mondo de Popper: „Mi ne bezonas vian kompaton!", la vivo kapablas diri al sia medio sen orgojlo sed ankaŭ sen kapitulaco. Tiel ĉi, la homoj kreskas preter la formato, kiun Szathmári kreis por la tragikaj protagonistoj de siaj ĉefverkoj; kaj la sakstraton de lia avangarda realismo povas eviti lia pli pozitiva, sed malpli specifa subteksto. Dank' al ĉi tiu pli larĝa lego de la teksto de la vivo, Szathmári ekpovis pluverki ankaŭ laŭ la tradicio de la araba klasikaĵo Mil kaj unu noktoj, kiu siatempe celebris la vivon. Lia novelo Supermilaj noktoj, kiu rekreas la kalifon Harun-al-Raŝid kiel konanton de la moderna kritiko de ĉiuj registoj tamen pretan regadi, frapas nin per la sama sereneco pri malmildaj konkludoj. Evidente Szathmári bone lernis de siaj spertoj, ke ne per la plej soldata severo oni atingas la plej solidajn konkludojn. Ni devas unue tion lerni de li, por poste alfronti la malfacilan taskon, preteriri la atingojn de lia herakla generacio.

Probal Daŝgupto
(Bharato = „Hinda Unio)

Festo de lia spirito

Giorgio Silfer: Desislava ridetas Lirika poezio kaj satira prozo. Eldonis: Kooperativo de Literatura Foiro, 1987,71 p. Prezo por Hungario: .....forintoj.

Do komence sur frontkovrilo de la libro mi ekvidis enigman vizaĝon de Desislava. Ŝiaj okuloj kaj ŝia rideto forte impresis min. Poste mi legis poemon dediĉitan al ŝi. Kaj jam kiam mi legis la aliajn poemojn, mi kaptis min je tio ke mi sentis ŝian rigardon kaj vidis ŝian melankolian aŭ pli ĝuste grandsignifan rideton.

Ciklo de la poemoj „Danka bukedo por Perla" donacis al mi aŭtentan plezuron kvankam mi bone memoris peton de la aŭtoro: „Akceptu ilin kiel bukedon kampofloran kaj ne forgesu ke pli ol unu havas dornan tigon".

Oni devas emfazi ke preskaŭ ĉiuj poemoj estas lumigitaj per lumo de la rideto de la bulgara princino Desislava (La Gioconda de Oriento).

Dank'al ŝia mistera rideto enhavo de multaj verkoj fariĝas komprenebla kaj la plej interesaj versoj restas en la memoro daŭrigante elradii sian varmon kaj malgajan saĝon: „Vi scias, ke ne plu nutros l' aeron la sono de niaj voĉoj" (la somero pasis) aŭ:

Se vi jam ne vidas futuron,
kiom valoras mia vivo?
Morgaŭ brokantu mian korpon,
efektive plej altan takson
ricevas mia ora dento,
aŭ la lensoj ĉe l'okulvitroj
(La aprilo bazaro)

Estas sciate ke ĉiu sento kaj ĉiu fazo de sento havas sian difinitan ritmon. Laŭ mia opinio Giorgio Silfer lerte sentas kaj kaptas tiun ritmon, ĉar la ritmo de liaj poemoj elvokas belecon. Memkompreneble estas ke belecon elvokas nur perfektaj aĵoj.

Eĉ ne plu voku Muzon
la sombro kiu min klinas
al grinca verso,
dolora pli ol raspita ungo.

Robert Frost opiniis ke stilo estas maniero per kiu homo ekkonscias mem sin. Sekve se maniero estas serioza, oni devas senti ĉeeston de humuro, sed se maniero estas komika, oni devas senti internan seriozecon.

La maniero de Silfer estas serioza, ĉar mi ofte sentas dum lego ĉeeston de la rideto de Desislava, en kiu estas ĉio: kaj malĝojo kaj humuro kaj ironio.

Kiam mi legis satiran aŭ humuran prozon, mi sentis „internan seriozecon". Laŭ mi la rakontetoj de Silfer estas luksa festo de lia spirito. Ekzemple al mi tre plaĉis „da paroj stultaj" Ĉu eble mi rekonis min? Ĉiuokaze mi decidis traduki ilin en la rusan lingvon por voĉlegado el podio. Mi ofte recitas miajn poemojn kaj miajn tradukojn. Mi scias kiel volonte aŭkultantoj perceptas rakontojn verkitajn kun humuro. Ĉi tiuj rakontetoj estas perfektaj, ĉar mi ne sentas eĉ unu superfluan vorton. Ĉiu vorto okupas sian lokon difinita per sento de humuro.

Sendube estas belega la rakonto „Serĉi loĝejon en grand-urbo" kun multsignifa bildo desegnita de Mika Picasso. La enhavo de la rakonto estas klara el ĝia titolo. Paro sen infanoj serĉas loĝejon. Ili aperigis anoncon en La Tribuno... De tempo al tempo al ili telefonas posedantoj de loĝejoj. Kaj antaŭ juna paro malfermas aŭ pli ĝuste nudigas sekretojn de homa interrilato en nia epoko.

Kiam protagonisto diris ke li havas tridekon da jaroj kaj lia edzino pli malpli same, tiam posedanto de loĝejo konfesis:

Jes ja, mi ĝojas, ĉar mia edzino kaj mi serĉas la homan kontakton kaj necesas la sama aĝo, por akordiĝi. Tio estas grava, se oni deziras amuzi sin kune...

Efektive. Mia edzino nomiĝas Nataŝa kaj ege ŝatas teatron, same kiel mi. Ni povus havi komunan abonon, se ankaŭ vi...

Verdire ne, mi intencis ion alian: vi scias, mia edzino kaj mi estas ŝanĝista paro...

La mikronoveloj „Kvin papavoj" estas ĉarmaj. Iuj demandas: ĉu ili estas prozo? Ĉu ili estas poezio? Oni povas diri kun certeco ke tio ne gravas, sed gravas tio, ke ili estas veraj belartaj verkoj, ĉar ili vekas en mi sentojn kaj pensojn kaj donacas estetikajn ĝuojn.

La libron plibeligas grafiko de Perla Ari Martinelli kaj ilustraĵoj de Stella Agostini.

Mikaelo Ternavski
(Sovetio)

„Nur la flip-flap"

Bernard Golden: Bestoj kaj homoj. Rakontoj, originale verkitaj en Esperanto. Eldonis: Edistudio, Pizo (Italio), 1987. 21 cm, 137 p. Prezo por Hungario: 220,- forintoj.

Kio estas „flip-flap"? La legantoj de Bernard Golden povas sciiĝi ke ili trafis la „onomatopeon de transturnataj paĝoj de libro". „Glug", „gra", „krak", „kraŝ", „ping", „plaŭd", „tranĉ" – tuta kolekto de sonoj helpas la aŭtoron en lia rakontado. Evidente, li havas kion rakonti: Kenjo, Gano, Svedio, Francio, Bahreno, Bulgario, Italio, Meksikio – enorma sperto de vojaĝoj tra teroj kaj kontinentoj postulas eksteriĝon kaj Bernard Golden, kiel aŭtenta rakontisto, vive prezentas al ni la etoson de la kazo. Lia heroo, prefere usonano, sed ankaŭ jugoslavo, franco, aŭ bulgaro, ne estas protagonisto de ferocaj aventuroj, memcerta atleto ludanta muskolojn kaj vivojn, nek inventema sciencisto, li estas simpla kaj sen pretendoj, kaj, vere, mi trovas tion la plej forta momento de la libro. Ja al mi tedis hebetaj superviroj kaj fatalaj superfemaloj de nia popola arto.

Kio do estas la stilo de „Bestoj kaj ho-

moj"? La unua rakonto iom maskas la sekvon, precipe ĝia komenco, kiu promesas psikologian kolizion. Tamen baldaŭ ni povas konjekti — la aŭtoro rakontas anekdotojn. Ja certe, Bernard Golden rakontas al ni anekdotojn kaj ni tuj kosntatas bedaŭrindajn atributojn de tiu ĉi olda ĝenro: la senpretendaj historioj estas kutimaj, infanece primaraj kaj diveneblaj ĝis diafano. Etaj ĝojoj kaj etaj homoj, etaj ruzoj en etaj embarasoj, eta kompato kaj ioma lasciveto plenigas tiun miniaturan mondon, precipe kontrastantan kun la anoncita geografia vasto. La sola surprizo, kiu tamen ne ekscitas optimismon, estas la indikoj ĉe la fino de la plejparto de la rakontoj: „Unua proza premio, Internaciaj Floraj Ludoj, 1979", „Unua proza premio, Belartaj konkursoj de UEA, 1982", „Unua premio, originala prozo, Literatura Konkurso de Madrida Esperanto-Liceo, 1980".

Povra originala Esperanta prozo! Jen estas ĝiaj laŭrokronitaj specimenoj! Nature, ankaŭ la monda beletro ne brilas en amaso. Nature, oni povus uzi la novelojn de Golden por ekzerci la lernantojn. Sed en ili mankas la ĉefa — mankas certa spirita valoro kiu devus konsistigi Esperantan kulturon. Por ke ĝi povu ion doni, kaj por ke oni povu ĉerpi el ĝi ion plian ol la onomatopean resonon de knabaj reprezentoj.

Mi ne pensas ke la averaĝa esperantisto estas malpli matura ol la averaĝa nacilingva leganto. Verŝajne, la lingvo de centmiloj, eble de milionoj rajtas esperi pli dignan literaturon. Iam, en aliaj epokoj eĉ mikroskope minca kultura tavolo permesis krei tion, kion ni nomas klasiko kaj kion ni prave admiras. La bona Esperanta prozo ne estas utopio, almenaŭ tial ke en la moderna Esperanto ja reale ekzistas la bona poezio de William Auld kaj Albert Goodheir.

En „Bestoj kaj homoj" estas rakonto, kiel la aŭtoro aludas la klefon de sia krea metodo. Konstatinte ke lia prelego ne atentigas la grupon, turista ĉiĉerono komencas fantazii laŭ la konjunkturo — amo, murdo, haremo — kaj tuj obtenas la sukceson. Amo kaj haremo ne estas forgesitaj de Bernard Golden, sed por esti justa, li ne profitas per murdo.

Kaj por esti sincera, mi dubas ke la aŭtoro ripetis la sukceson de sia heroo, ĉar lia farsa amo ne povas konkurenci kun tiu el „Dekamerono", same kiel lia harema erotiko evidente cedas al multaj produktoj de tiu speco.

— Bone, ni lasu en paco tiujn „pimpajn ĉarmulinojn" kaj iliajn usonajn kaj francajn kavalirojn. Ja krom tio almenaŭ io restas.

— „Nur la flip-flap"

— Flip-flap...?

— Jes, „la flip-flap de la transturnitaj paĝoj".

Alen Kris
(Sovetio)



RECENZOJ

Omaĝo al la fikcieco

Damir Mikuliĉiĉ: „O" kaj aliaj rakontoj. Tradukis: Jovan Zarkoviĉ. Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1988. 20,5 cm, 217 p.

Tiu ĉi verko prezentas la ĉiaman homan scivolemon pri la ĝenerala ordo de la mondo, kosmo, universo. Pli ĝuste la libro prezentas unu el la specifaj formoj de tiu scivolemo, nome „fikciaĵon". Kies loko en la belarto, ve, ĝis nun estas disputebla kaj disputata malgraŭ okulfrapa pruvo: ankaŭ scienco prezentas al ni scivolemon kaj ĝeneralan ordon de la universo. Cetere, ĉiam ĝi faras tion „objektive", ĝis tiu grado de „objektiveco", kiu sufiĉas ridigi la posteularon. La scienco kontentigas la scivolemon de vivantaj samtempuloj. Pli-malpli kontentigas. Ĝuste la rilatumo inter kontentiga taŭga klarigo kaj supozebla, ebla ordo de la universo naskas specifan formon kutime nomatan „fikciaĵo". Stranga nocio: evidentas, ke ajna formo de la daŭra pensado pri la mondo ne povas montri mankon de la fikciaĵo sen risko fali en stagnadon, en „finitan scion". Kiel senkondiĉa imperativo sonas la vortoj de la protagonisto Fa Raon el la rakonto „Pela, sankta serpento": „Ekzistas nur fortoj, kiuj blinde agas laŭ iu, al mi ankoraŭ ne klara, ĉefleĝo". (p. 10) Do, jukigi la langon je la konto de tiu „lasta determinanto", ĉefleĝo, rajtas iu ajn en iu ajn formo. Kiel alternativo de la scienco, la fikcio (kiu preskaŭ ĉiam estas ja sciencal) rajtas prezenti sian mondpercepton, klarigi la mondon laŭ sia povo. La kombino de la nocioj „scienco" „fikcio" indikas dume malgrandan povon de la lasta nocio, ĝian grandan malkuraĝon. Ankaŭ la libro prezentata estas stampita de tiu malkuraĝeto, kiu nune estas ĝenerala. La disputo, dialogo inter la fikcia kaj scienca „ordoj" estas febla, sekve malpli dialektika, ol ĝi povus esti. Malkonsento, neado, ĝenerala disputo dialoga, kiu ja estas movanto de la dialektiko, povus esti pli akraj, pli drastaj. Ne temas pri la enhavo. Ekzemple en la rakonto „Marstelo" la enhavo parte eĉ eksmodiĝis. Ne plu ekzistas akra disputo inter la „puraj" fizikistoj kaj „ĝisostaj" biologiistoj. En la rakonto ilia dialogo ne estis fruktodona sen dialektiko. Ili ambaŭ rutinas en sia „isteco" kaj nur gapas nekutiman formon de la „alia" universo. Ilia disputo ne naskis dubon, kiu povus supozigi ilin pri la alia ordo. Do, ne okazis dialogo inter dogmo kaj supozo, aludo. Sed la penso de la sama rakonto disputas tamen kontraŭ la ordo de nia kosmo. Kvankam ne sufiĉe malscience...

Pli da kuraĝo oni povas vidi en ĉiuj ceteraj rakontoj de la libro. Precipe en „Dizertulo". En tiu rakonto la aŭtoro disputas kun la sociaj, etikaj ordoj de la nuna, ĝisoste scienca tempo. Kutime la verkisto-fikciistoj ne tuŝas sociordon kaj moralon. Precipe la lastan ili ne tuŝas. La ĉiama nuntempa kompreno de amo, ĵaluzo, familio traas iun ajn fikciaĵon. La sociordo iomete pli varias, sed, fakte ne sufiĉe. Regas la socio kun la nuna „tabelo de valoroj" netuŝitaj. En „Dizertulo" la aŭtoro ne proponas ion el fikciujo, sed primokas tamen iom da elementoj el nia sankta kolektaĵo. Kaj ĝuste la mokado restigas sufiĉe da ebloj plufikcii al la leganto mem, ĝis ebla kolizio kontraŭ iom da dogmoj. Entute la libro postlasas dezíron revizii bildon ĉu de nia pasinteco, ĉu de nia estonteco. Tio, miaopinie estas la plej valora eco de libro fikcia.

Aldone iom da vortoj pri la nekutima formo de la frazoj. Temas pri „form zono", „nom lumeklipso", „egesekretoj" (anstataŭ „sekretegoj"), „cel kiuj", „cerbumi pri oj kiuj", „kelkajn ojn" ktp. En tiu ĉi libro tiuj formoj estas logikaj, ĉar la ordo de la kara lingvo aŭ ties parto ne estas poreterna, kaj certe enhavas alian ordon, kiu ne nepre estas tuj akceptebla, sed kiu ekzistas tamen implicite.

Viktor Sapoĵnikov
(Sovetio)



GAJA PAĈO

Nur unu!

La etulino jam plurfoje malfruis, pro kio la lernejo sendis averton. Paĉjo kaptis do plumon, kaj skribas al la instruistino: „Sinjorino, bonvolu kompreni, ke mi havas tri filinojn, sed — nur unu spegulon!"

Eta filozofo

— Ej, ej, knabeto! Kial vi krueladas tiel? Ĉesu tiri la voston de la kato!

— Mi nur tenas ĝian voston, estas ĝi kiu tiras...

Ĉu draŝi?

— Fileto mia, jam nepras draŝado pro tiu aĉa klasifiko!

— En ordo, paĉjo. Mi montros, kie loĝas la instruistino.

Nur en Hindujo?

— Paĉjo, mi aŭdis en la lernejo — demandas la etulino — ke la edzoj en Hindujo nur post la geedziĝo ekkonas sian edzinon.

— Samtiel okazas ĉe ni, mia filinjo... — murmuretas la patro.

Edzino — foje

— Mi pardonas vian malfidelecon! Malgraŭ viaj trompoj, ĉar mi daŭre amas vin!

— Dankon, kara — sed bonvolu jam foriri, ĉar en ĉiu ajn momento revenos mia edzo!

Edzino — duafoje

Sinjoro Verdavalo post longa laboro alvenis hejmen en malfrua horo.

— Ĉu estas vi, mia karega? — krias la vekiĝinta edzino.

— Ne, ne! Mi estas via edzo.

Inter si

Dancistinoj kverelas akre ofendante unu la alian.

— Vi, vi — eĉ tion ne scias, kiu estis via patrino!

— Ne menciu mian panjon malice! Povas esti, ke ĝuste vi estas tiu!

Kameleco

Juna pasaĝero fikse rigardas la kontraŭe sidantan fraŭlinon.

— Kiel belan pulovron vi portas — li komencas la atakon.

— Ja, ĝi fariĝis el vera kamela lano — ŝi fieras.

— Nu, tion mi tuj rimarkis, vidinte la ĝibojn.

Kiaj po-etoj!

— Gratulon, kolego! Mi komplete komprenis vian poemon, aperintan en „Verda Samideano".

— Ĉu vere? Eble mi verkis ĝin ne sufiĉe artplene...

Kiaj tempoj!

Surstrate renkontiĝis du pastroj, kaj ili ekplendadis:

— Kiaj tempoj, kiaj tempoj! Malpli da entombigoj al ni, apenaŭ da geedziĝoj...

— Jes, jes — interrompas la alia — kaj se ni ne vizitus foje-foje niajn ŝafojn, eĉ neniaj baptoj...

Kia vanteco

— Rakontu jam Petro, kial vi sidis en malliberejo?

— Tion kaŭzis la eterna envio! Forte ĉagrenis la vantecon de la ŝtato, ke mi fabrikis ĝuste tian monon kian ĝia monfarejo.

Blovu!

— Mi vidas, ke vi multe drinkis! — konstatas policisto apud la haltigita aŭto.

— Tute ne! Neniom, estu certa!

— Do tiam blovu iom en tiun tubeton!

— Ĉu en la dekstran aŭ en la maldekstran...?

Individuo!

— Oni proponis al mi postenon en la urba orkestro, sed mi rifuzis — rakontas aplombe la juna violinisto.

— Ne diru! — miras la kundrinkantoj. — Tiun firman postenon? Kial?

— Mi neniel povas akcepti, ke ia orkestrestro direktu la taktojn al mi.

Firma volo

— Vi dekadencis, kolego, pro malforta karaktero! — grumblas la ĉefo. — Drinkado, inoj, kartludo sukcese delogis vin!

— Tute kontraŭe, ĉefo! Per firma volo kaj animforto mi venke alkutimiĝis al ĉiuj ĉi!

Redakcie

Ĉefredaktoro (ne de H.V.!): — Mi rekomendas forstreki el tiu artikolo almenaŭ cent liniojn.

Redakciano (ne de H.V. kompreneble): — Sed la tuta artikolo enhavas nur tiom.

Ĉefred. (ne de...): — Nu, ĝuste tial!

Dentisteje

— Terura filo! — riproĉas la dentisto. — Vi disipas mian monon! Ĉu vian menson ne tuŝas, kiom da homaj doloroj gluiĝas al ĝi?

Ervin *Fenyvesi*

Kiam mi timas

Ni citas la lastajn versojn de samtitola poemo de John Keats: „Ke mi ne vidos cin plu en ĉi mondo, / Ne trovos guston en la fea forto / De l' am' senzorga; – tiam sur la bordo... – la daŭrigon vi trovos en H. 1. kaj V. 1. (alsendendaj linioj.) Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

HORIZONTALE: 14. Memvola kuniĝo por komuna celo, 15. Persona pronomo, 16. Ŝanĝiĝanta laŭ la cirkonstancoj, 17. Maŝinpafilo, 19. Identaj konsonantoj, 21. Resti senmova sur la piedoj (R), 22. Muzika ritma melodio, 23. Honoras kiel diaĵon, 26. Havanta korinklinon, 27. Prefikso montranta malĝustecon de ago, 29. Havantaj formon de ovo, 31. Verba finaĵo, 32. Reen: liternomo, 33. Tro taksos siajn meritojn, 36. Peco de teksaĵo (R), 37. Mezepoka franca poeto, 38. Rehavigi, 40. Speco de papago (R), 42. Reen: refleksiva adjektivo, 43. Rulgvidilo de vagonaro (R), 44. Buŝopart', 45. Ŝipano (R), 47. Ŝanĝo de loko, 49. Angulo (geometria) (R), 50. Konusforma korbeto por fiŝkapti, 51. Mauro Nervi, 52. Reen: plenda krio, 54. Ĉieldirekto (R), 56. Ne halti (R), 57. Malgrandegulo (R), 59. River' en Venezuelo, 61. Mona... , 62. Sankta bild', 64. Simile kiel H. 56., 65. Ne konsonanton, 67. Cyrus ... Usona politika aganto, 69. Prepozicio, 71. Priskribi, raporti (R), 72. En tiu loko,

VERTIKALE: 2. Enpaŝis, 3. Kunfiksis metalajn per fandita metalo, 4. Plenkreskulo, 5. Grand...: vidu la antaŭan difinon, 6. Ne kun alia, 7. Prepozicio, 8. Ekskursi, 9. Novaj konsonantoj!, 10. Germana artikolo, 11. Perpendikla, 12. lama Tajlando, 18. Impresos la flarsenton, 20. Flava sekrecio de hepato (R), 24. Produktaĵon de birdoj, 25. Luno de planedo, 28. Speco de kolonoj, 30. Hebreo (R), 33. Prefikso, ankaŭ interjekcio, 34. Plej bona parto (R), 36. Korpoparto, 38. Image-dezirate, 39. Persona pronomo, 41. Dua silabo de H. 17., 43. Havenurbo ĉe Dono, 46. Ago sin movi, 47. Granda germana romanverkisto (1875-1955), 48. Ekĝojo!, 50. Restas samloke (du vortoj), 51. Labori per brikoj, 53. Malplenas, 55. Sin movi, 56. Aviadilist', 58. Skribe rimarki, 60. Besta pikilo (R), 61. Servisto (R), 63. Latina neado, 66. Dombesto (R), 68. Identaj de inko, 70. Samaj konsonantoj.

I.Z.



Solvo de la krucenigmo en la n-ro 1988/4:
La liberiĝo de la juĝisto – Mistero minora – Flamsalamandro – Vivraporto – La granda aventuro – Libera rabo – Marteno. (Verkoj de Francisko Szilágyi)

Premion gajnis per lotumado:
Anna Dvoráková, Tvrdosin, CS; Frohmut Kalles, Haldensleben, GDR; Eŭgeno Perevertajlo, Taŝkent, SU.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Dum vi estis kun ni
de István Nemere

Tiu ĉi nova libro de la konata verkisto aperis samtempe en hungara kaj Esperanta lingvoj, kaj pritraktas interesan problemon de eŭtanazio en kadro de romano, kiu kombinas sociajn, psikologiajn kaj detektivajn motivojn.

1. Sub kiu adreso loĝis la mortinta sinjorino K. Balázs?

2. Kiajn medikamentojn ricevis la malsanulino?

3. Kiom da jaroj havis pastro Murányi?

Limdato: du monatoj post la apero

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1988/4:

1. MUT: Malgranda Unuo de Tempo – Tera horo; GUT: Granda Unuo de Tempo – Tera jaro.
2. Prof. Siderus: prezidanto de kosmofenia sekcio de Akademio Metastella.
3. Reformo de stelatlasoj: ĉ. en la jaro 9800.

Premion gajnis per lotumado: s-ro Ivars *Barŝevski.* Sovetsk. SU; d-ro Otto *Kaczinski,* Havelberg, GDR. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Libroj por ĉiuj...



Filozofiaj rakontoj...

Politika aventurromano...

Meditiga romano pri eŭtanazio.

Korespondi deziras

Esp. Rondeto – 40 infanoj (10-14 j.) ktm, pĉt. garantias respondon Valerij *Malihin, Krasnojarsk,* ul. Konstitucii 1, SU-660.049. – F-ino Danuta *Skwarlo* (24) kun geamikoj. *Tarnowiec,* Sadkowa 41, PL-38-204. – F-ino Agata *Pochopien* (19) pri muziko, literaturo, turismo. *Stryszawa* 783, PL-34-205. – Inĝ. Elzbieta *Pastwa* (26) en politekniko, ktm. *Poniatowa* ul Kraczewicka 24/54. PL-24-320. – S-ro Andres *Aruoja* kun filatelistoj tm. KEHRA, Kingissepa 11-41, Estonio SU-202.240. – Inĝ. Leon *Chodera* (48), interŝ. E-revuojn, int. E-problemoj k.a. *Warszawa* Krasnobrodzka 17m190. PL-03-214. – Pentristo Vladimir *Banickov* (37) pri arto k.a. *Doneck* Krasnogvard. prosp. 14-61. SU-340-052. -- Pentristino Laima *Gulmane* (21) pri kulturo, muziko, vojaĝado, ŝatas ledoaĵojn. *Riga* R. Eihes 5/1-73, Latvio SU-226.057. – Elzbieta *Solak* (36) edzino, ktm, pĉt. *Opole* ul. Kolataja 19/7. PL-45-064. – Oficistino Danuta *Ryl* (37) pĉt. *Glogów* ul. Orbitalna 13/7. PL-67-200. – Farmaciistino Nijolé *Arūnaité* (25) ktm pri medicino, novaj med., turismo k.a. *Panevézys,* Litovio SU-235.300. – Oficistino Bogna *Lachowicz* (23) ktm. *Nowy Sacz,* ul. Kazimierza Wlk. 23-19. PL-33-300. – Waldemar *Rzeszowski* (18) pri sporto, turismo, filatelo, muziko, kol. pm, bk. *Kleczany* Chomranice 139. PL-33-394. – S-ino Miaria *Jagiello-Dangow* kaj filino Maja (22) studentino, ktm, pĉt. *Gliwice,* str. Styczynskiego 37-6. PL-44-100. – Anatolio *Dovbiŝ* (45) sperta E-isto kun H kaj aliaj, interŝ. E-aĵojn, bk (bestoj, aktoroj, sporto), poŝkalend., ekslibrisoj. *Ŝostka* 7, pk. 27, Ukrainio SU-245.110. – F-ino Endel *Pajula* ktm, kol. E-literaturo, pm, pk. *Ambla*, Estonio SU. – Stanislaw *Broniewski* (30) pri turismo, kol. pm, bk. *Katowice,* PCK 9m7. PL-40-057. – S-ro Genek *Swiech* (32) instr. de angla, kun gehungaroj, parolas eĉ hispane, arabe. *Mrozy* 3-Maja 23, PL-05-320. – S-ino Ludmila *Semenenko* el Belorusio ktm, pĉt. *Slonim,* str. Dovatora 4a-51, SU-231.800. –

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

MÉMMI Agrinprop Iroda, Gödöllő – 262/89.

1989 APR 1 Z

Nord-Transdanubia
Brik- kaj Tegolfabrika Entrepreno

la brikego HB·38

nova PRODUKTAĴO



estas uzebla ĉe ajna domo por muroj dividantaj aŭ plenigantaj spacojn. Laŭnorme termizola – sen cetera izolado.

Teknikaj datoj

Mezuro mm	Maso kg	Kavo-volumeno %	Premrezisto averaĝa MPa		Akvo-akcepto %
380 190 140	8,7 - 9	min.35	Kl. 1. Kl. 2. Kl. 3.	7 5 3,5	min. 10

Volumena maso: maks. 900 kg/m^3

Por m^2 de muro: 34 pecoj

Produktas: BRIKFABRIKO KISBÉR

Vendas: la entrepreno en Győr, Türr I. u. 5.
Telefono: 96-11-333 Telekso: 24-513

TÉGLAIPAR GYŐR



KOLOR-TELEVIDILO „THOMSON"

frekvenco-sinteziga agordigo • mikroprocezila regado

Miniaturaj rezistiloj, kondensiloj (MELF) kaj larĝ-skale integritaj cirkvitoj estas aplikataj en ĝi. La muntado, la ĝustigoj kaj la kontroladoj dum la fabrikado estas plenumitaj permaŝine sub komputila regado.

VIDEOTON

H-8001 Székesfehérvár, Berényi út
Pf. 104.
Hungario

Telefono: (36 22) 12-730, 13-030
Telekso: 21-331 h

1989 APR 17